Jaro IV/IX. N-o 1 (37-38) Oktobro-Novembro 1926



Monata Organo
de Sennacieca Asocio Tutmonda
FONDITA EN 1919

Literaturo - Scienco - Pedagogio

ENHAVO :

Marcelle Vioux: Ĉe la Porinfana Tribunalo. Trad. Johano. — *Av. Isahakjan* : Abu-Lala-Mahari. Trad. G. Sevak. — *L. Ivn* : Janko la junpioniro. — *Hristo Botev*: Batalo. — *Stebek* : Hristo Botev. — *N. V. Nekrasov*: Siberia lulkanto. — *G. Dem.* : Vizaĝoj kaj Naturo. — *De Bruin*: De kie la suno akiras sian varmon ? — *O. Droĵĵin* kaj *G. Demidjuk*: Fabrikoj de Nutraĵo. — *M. Bakunin* : Integra instruado. — *Mark Starr* : Komparo de edukado en U.S.S.R. kaj Britio. — *K. Kaŭtsky* : La unuformeco de l' Mondkulturo.


ÖNB
+Z62253604

Redakcio : 1-a Tverskaja-Jamskaja, 35, kv. 5. Moskvo, I (USSR)
Administracio: Rich. Lerchner, Colmstr. 1. Leipzig O 27 (Germ.)

700.051-B.E.p-
1926-1927



ÖSTERR. NATIONALBIBLIOTHEK
WIEN

REDAKCIA ANGULO

Per duobla — oktobra-novembra — kajero ni komencas la novan jaron.

Ni utiligas tiun duobligon de l' amplekso por montri, kia povas esti la diversfakeco de nia revuo kaj, sekve, kiom multajn kaj diversajn interesojn ĝi povas kontentigi. La leganto trovos en la hodiaŭa kajero krom la belliteraturaj verkoj — rakontoj kaj versaĵoj — artikolojn el plej diversaj fakoj: jen biografio, jen literatur-kritika skizo, jen pri-arta artikolo, jen la soci-scienca, la naturscienca kaj, fine, la pedagogiaj-artikoloj.

Tia povas esti daŭre nia revuo, se niaj kunbatalantoj daŭre kaj vigle kunlaboros. En nia SAT estas diversfakaj kamaradoj kaj, certe, ĉiu povus rakonti ion el sia fako, kio estus nova, interesa kaj sciinda por la aliaj. Inter ni estas kamaradoj, kiuj atente sekvas sukcesojn kaj progresojn de sciencoj, ili do povus informi per la paĝoj de nia revuo aliajn SAT-anojn pri multaj sciindaĵoj. Fine, multaj kamaradoj sekvas disvolviĝon de literaturo — ili, legante novajn verkojn, povas elekti kaj traduki rakontojn kaj fragmentojn komune-interesajn por ni. Nia SAT-anaro, aktive partoprenante la vivon, plej bone povus respeguli ĝin: ĉar ni estas dissemitaj tra la tuta terglobo, sekve ni povas fotografi la vivon el plej diversaj vidpunktoj; kaj ĉar ni ja estas diversfakuloj, ni povas respeguli la plej diversajn facetojn de la vivo.

Kelkaj kamaradoj bone komprenas tion kaj nenio haltigas ilin por kunlabori vigle kaj aktive en la revuo. En la hodiaŭa numero, ekzemple, estas presataj kunlaboraĵoj de kamarado el lando de blanka teroro, kiu prokrastis neniun *liberan* tagon por kunlabori: ĵus forsendinte verketon, kiu estis presita ĉe ni antaŭ jaro kaj duono, li estis arestita kaj enkarcerigita; nur post la liberiĝo li povis tralegi presita sian verketon kaj li ne prokrastis iun tagon por denove sendi kelkajn kunlaboraĵojn. Jen ekzemplo, kiun imitu niaj kama-

(Daŭrigon vidu sur 3-a paĝo de la kovrilo.)

 **LITERATURO** 

Ĉe la Porinfana Tribunalo

EL LA LIBRO « MARIE DU PEUPLE » (MARIO EL POPOLO)

Marcelle VIOUX

Mario Mercier, juna virino el popola deveno, kiu estis kompate akceptita de Johano Darberel, ekscias, ke ŝia filo, dekunujara kaj preskaŭ nekonita de ŝi, forkuris el la domo de l'kamparanoj al kiuj li estis konfidita, kaj poste ke li estis tuj juĝota en porinfana tribunalo.



.... Je la dek-tria, la sekvantan tagon, ŝi trairis la grandan pordegon de l'«kajo de l'Oraĵisto», petis sian vojon al deĵoranta policano. Li montrosciigis al ŝi la malgrandan pordon, dekstre je la enirejo, kie maljunuloj kaj virinoj portintaj pupojn senparole piedfrapadis. Apogiĝinte kontraŭ la muro, Mario revidis sian infanon ĉe ĉiuj diferencjaraj buboj, kiuj atendis la malfermiĝon de l'pordo por vidi juĝi siajn fratojn kaj fratinojn: li estis havanta tiujn belajn blondajn harbuklojn ĉirkaŭ sia lakt-kolora vizaĝo; li estis suĉanta sian dikan fingron, kiam kreskis liaj unuaj dentetoj, kiel ĉi-tiu; li estis dormanta ridante pro raviteco en la patrinaj brakoj, kiel tiu pupo; li estis demandanta, levantè sian malgrandan scieman kapon, kiel tiu alia.

La pordo malfermiĝis. La dentoj de Mario klakis, kaj ŝiaj kruroj moliĝis. Ŝi diris: Ha! senkonscie, kaj per siaj ŝanceliĝantaj kruroj, ŝi eniris malantaŭ la aliaj parencoj en senaera kaj senluma ĉambro. Malmilde virino demandis al ŝi:

— Ĉu vi havas vian fraton aŭ vian fratinon, ĉi-tie?

— Mian filon... ŝi diris.

Surprize kaj kompate oni ŝin rigardis, kaj poste, unutone la babiladaĵoj rekomenciĝis. Fine Mario distingis la vizaĝojn en tiu mallumo malbonodoranta; ŝiaj rigardoj renkontis malĝoje malviglajn rigardojn. En duobla ĉambro, tute proksime, oni aŭdis la zumadon de voĉoj de infanoj alkondukitaj de l'malliberejo. Gardisto malpermesis la alirejon de l'juĝa kunsido, kie la malgranduloj estis juĝataj, nur antaŭ siaj parencoj,

atestantoj, uloj de filantropiaj protektasocioj kaj unu-du bonvolaj advokatoj.

La gardisto nomvokis parencojn kaj atestantojn. Mario iĥin rigardis eliri tra tiu pordo, preskaŭ konfidemaj, kaj ridetantaj, kaj poste eniri larmegaj kaj furiozaj aŭ stultege rezignaciaj.

Virino, kies elspiraĵo malbonodoregis vinon, ĉirkaŭita de kvar infanoj, mamnutris la kvinan. La infaneto ploris, ĉar ĝi estas tedita suĉi malplenan mamon, kaj la patrino metis malpuran fingron en ĝian buŝon por ĉesigi ĝiajn kriojn.

Ĉiuj ĉi mizeruloj konversaciis pri la honta porinfana malliberejo, de tiu « Petite Roquette », kiun ili estis bone konintaj, ĉar tie ili vizitis siajn infanojn : la mallumajn ĉelojn, la senaerajn kaj sensunajn kortojn, la forestantan akvon, la malpuraĵojn lasitajn en la ĉeloj, la senhonoregajn surskribaĵojn, kiujn la spirito de l' senmaliculoj ripetadas, la insektaraĉon, kiu multegiĝas, kaj pli malbonajn malnoblegajn...

Viroj blasfemis kaj kraĉis, amplekse, kun malestima majesteco. Patrinoj ploris mallaŭtege ; aliaj kantetis por kvietigi la bubojn, kaj malgraŭ kantoj kaj ploroj miksitaj, la gardisto ĉiam restis indiferenta, atentis pri la fermigo de l' pordo. Sed paroloj trapasetis tra la muroj, kuris laŭlonge la koridoron.

La admona voĉo de l' tribunalprezidanto demandis :

— Ĉu ci ne hontas tiamaniere vagadi ? Ci estas arestata ĉiuduonmonate !

Kaj mallaŭta voĉo respondis, malspiteme :

— Se mi estus riĉa, vi min nomus turisto anstataŭ vagemulo, kaj vi ne arestigus min....

— Bonege dirite ! piedo de brasiko ! ekkriis laboristo, kiu venis tie pro sia fratino, kiu estis tiea kutima vizitantino.

La virino havinta kvin infanojn estis nomvokita ; ŝi leviĝis indiferente, konservis kun si la plej malgrandan fine dormantan, kaj komisiis la aliajn je la flegado de l' parencoj. La unuenaskita tuj ekludis per pilko farita el volvitaj ĉifonoj kontraŭ la muro de l' ĉambro, kie oni kondamnis lian fraton. Kiam la patrino returnenvenis, la vizaĝo karmezina kaj la okuloj brilantaj pro kolero, ŝi kunigis per unu gesto ĉiun sian infanaraĉon, kaj sensalute eliris kurante. Poste estis la vico de virino, kiun oni aŭdis ploregi kaj krii malgraŭ la laŭta voĉo de l' tribunalprezidanto. Ŝi reeniris kiel trombo, kaj lasis sin fali sur la benko, kriegante :

— Li rompis kvar stratlanternojn kaj oni lin metas en protektasocion, kie oni malpermesos al mi lin vidi ! Kaj pro tio, oni lin metis en malliberejon, kiel stratulaĉojn ! Ne estas eble ! Protektasocio estas tute egale kiel pundomo ! Pro kvar stratlanternoj ! Sed mi pagos iliajn stratlanternojn ! Ho ! Ho ! Ho ! Ho ! Luĉjo mia ! Ho ! Ho ! Ho ! Ho !

La zuma voĉo de l' prezidanto rebruis ;

— Forkonduku tiun virinon, gardistoj! Nu, oni ne plu sin interaŭdis, tie!

Du gardistoj prenis la malfeliĉulinon subbrake, kaj ŝin forkondukis en la korton. Ŝi humile petegis ilian kompaton, sed ili, kion ili povis? Kaj la kutimo estis senkompatemigínta ilin. Ili plurfoje diris:

— Nu, silentu vi iomete! silentu do!

Sed oni aŭdis ankoraŭ dum longa tempo ŝiajn nehomajn kriojn. Laboristo, tre pure vestita, kun malĝoja mieno, diris:

— Oni ne devus permesi al viroj, kiuj eĉ ne estas familipatroj, juĝi infanĉjojn.

Mario timtremis pli kaj pli, kaj ĉion aŭdis kvazaŭ tra nebulo. Ŝia fido forlasis ŝin: neniu el la juĝitaj infanoj estis reliberigitaj. Kiam oni falas en la manaĉojn de «Justeco», ĉu dek-du-jara, ĉu tridek-jara, estas por ĉiam... La malfeliĉulino dezirus, ke ŝia vico rapide alvenu, sed ĉiufoje kiam la pordo malfermiĝetis, kaj kiam la gardisto malfermis la buŝon por krii nomon, ŝi mense petegis, ke oni ne nomvoku ŝin tuje, ke oni permesu je ŝia batadanta koro lasi spiri.

Kaj la arogante decideca voĉo de l' juĝoprezidanto, aŭdita ne konstante, trapikis ŝin, kiel tranĉilo. Tiu viro, kiu ĉiutage eltrovis fontojn de patrinaj larmoj, ne vane perdis tempon aŭdi la nesufiĉajn klarigojn malklare elparolitajn de parencoj, kaj la pardonpetojn kaj kvazaŭsenkulpiĝojn de bubaĉoj: ĉi-tiuj estis lacaj, malpuraj, parazitarplenaj, senzorge vestitaj, similaj je veraj krimuloj post nokto en la provizora malliberejo, do ili estas kulpaj. Kaj ĉiudekminute, juĝo estis elparolita; ĉiudekminute plia korpremegeco subite sin deĵetis sur teron, kiu ĝin ne bezonis.

— Virino Mercier, nomvokis la gardisto. Li helpis ŝin leviĝi, ĉar ŝi tute ne povis sin movi. Ŝi lasis sin konduki fermante la okulojn, ĉar ŝi timis fali vidante la plankon ĉirkaŭmoviĝintan sub siaj kotonaj kruroj. Fine ŝi sidiĝis kaj vidis maljunulon enprofundiĝintan en brakseĝo kaj ludintan per papertranĉilo.

— Nu, mia knabo, rakontu vi tion, kion vi faris.

Mario deturnis sian kapon, aflikte, kaj abundo da larmoj blindigis ŝin; malantaŭ barilo, inter du gardistoj, ŝia filo staris. Malfortike li aspektis, kiel knabineto, kiu tro rapide kreskis. Lia jako kun tro mallongigitaj manikoj, lia ĉemizo kaj pantalono estis veraj ĉifonoj. Ŝi rimarkis la nigrajn ungojn krispiĝantaj sur la barilo, kaj poste ŝi ne plu forturnadis sian rigardon de l' belaj bluaj okuloj, kiuj ŝin avidege rigardis.

Ĉar la akuzato ne respondis estante tute okupita pri sia patrino, la prezidanto diris, malfervore, ludigante siajn blankajn fingrojn en sia silka barbeto, kaj tornante folietojn antaŭ si:

—Vi nomiĝas Andreo Mercier. Vi forkuris el ĉe la kamparanoj al kiuj via patrino konfidis vin. Vi diris por via senkulpiĝo, ke tiuj kamparanoj al vi rakontis senĉese malbonon pri via patrino, kaj ke oni devigis labori vin pretekstante, ke via pensio ne plu estis pagata.

Mario subite levis sian kapon por protesti.

—Malparolu, sinjorino. Vi respondos, kiam mi vin demandos, diris la tribunalprezidanto, kiu denove parolis: vi diris ke vi alirus Parizon kun intenco retrovi vian patrinon, kiun vi supozus malfeliĉa, kaj ke vi volus labori por ŝi, anstataŭ labori por viaj nutroparencoj. Bedaŭrinde viaj agoj ne akordiĝas kun tiuj belaj paroloj.

La infano ĉesis fiksi siajn okulojn kontraŭ sia patrino, kaj rigardis malrespektege la prezidanton.

Mario plie timtremis antaŭvidante, ke tiu sintenado havigis al li la plej gravan punon, kaj en la senaera ĉambro kun nudaj muroj grizaj, kun intensega odora, kie lumo estis necesa je tagmezo, ŝi iom post iom sentis, ke ŝia malforta espero forflugis.

La kapo inter siaj manoj, ŝi aŭdis la rakonton de l'infano jam ribelinta:

—Vi diras la veron, juĝista moŝto, kaj vi ĝin ne diras! Mi foriris, ĉar mi opiniis, ke mono de mi gajnita helpus mian patrinon. Kial mi laboraĉus por la malŝatinduloj, kiuj al mi malbone parolaĉis pri ŝi? Jen, mi venis Parizon, laborante dum vojirado. Sed kiam mi iris hotelon, kie mi sciis, ke ŝi loĝis, mi ŝin ne trovis, kaj la hotelestro forpuŝaĉis min straten, dirante ke lia hotelo ne estis infanetejo. Estis do tute necese, ke mi elturniĝu. Sed oni demandis al mi, kial miaj parencoj ne prezentis min. Mi estas ne sufiĉe aĝa por senpere serĉi laboron. Tamen laktovendistino dungis min, sed uloj ŝin timigis dirante, ke ŝi multe riskis, ĉar oni ne konis mian devenon, ke mi ne estis sufiĉe aĝa....

—Mallongigu vi! Mallongigu! Priparolu ni la aferon!, grumblis la prezidanto.

—Nu, ĉi-tiu virino min maldungis nepagante. Mi vagis do, kaj mi malsatis. Mi ŝteletis pecon da viando ĉe montraĵaro, sed oni ne povas ŝteli panon, juĝista moŝto! Pano estis enfermita en la panvendejoj, dum viando estis atingebla por la manoj, ekstere.... Policano vidis min. Li kuris post mi, kaj min atingis. Kompreneble, mi baraktis.... Li postulis miajn legitimajn paperojn, kvazaŭ mi povis havi legitimajn paperojn! Mi eĉ ne sciis tion, kio estas je tiu momento!...

El franca lingvo tradukis
JOHANO (1771).

ABU - LALA - MAHARI

Av. ISAHAKJAN

Sesa Surah'o

Kaj la karavano de Abu Lalao ĉe pordegoj de la Granda dezerteg'
De Arabistano haltis pro laciĝ'....
Kaj en malproksimo brilis horizonto de la sunhardita vasta dezerteg' ;
Nokto reekprenis la velurvualon ; per ruĝegaj flamoj plaŭdis la ĉiel'.
Kaj Abu-Lalao ĉe la karavano sole eksidiĝis kun kontent' kaj bril'.
Kapon apoginte al ŝtonegoj oraj, per rigard' naĝante al la malproksim'.
— « Kiel nun libera estas mi senlime ! Ĉu kapablos iam Granda la dezert'
Ĉirkaŭbraki parton de l' libero mia ? Ne, nemezurebla estas ĉi liber' !
Min jam ne atingos la homaĉa mano, kaj ne trafos min jam ajna homa
[far'.
Ho, libero mia, ci odoro luma de la paradiza ĉarma rozflorar',
Per lumrozoj ciaj ci min ekornamu kaj al mi bruligu torĉojn en anim'.
Ho, libero sankta, Al-Koran' *senmorta de la najtingaloj el la paradiz'.*
Vi, dezert' belega, vi, oraĵa lando de la izoleco, vin salutas mi.
Grundoj ĉaste puraj, kie eĉ ne foje homo glutis homon, vin ekbenas mi.
Vi ekdisvastiĝu kaj dissternu grandajn marojn da sableroj al malĉasta
[mond',
Por sufoki sub la akvo ĉiujn homojn, domojn kaj palacojn, ĉion ond' post
[ond'.
Kun turnvento via sur la mond' ektronu la libero, kiun jen atingis mi,
Kaj la sun' majeste de la supr' orbrilu al libero granda en la tuta mond'. »
Kaj kun milaj ĉarmoj, kun logaĵoj milaj, kun raviga brilo de la helradi',
Riĉe vualita per hararo ora Suno ekaperis forta pli ol di'.
La dezert' grandega sin eksternis vaste antaŭ la okuloj de l' majesta sun'
Kaj ekbrilis flame, kiel ora felo de leon' grandega fabela dir'.
— « Sun', al vi salam'on [1], vi, miloble glora, vi, senmorta mia panja
[ĉirkaŭpren',
Vi, la sola bona, vi, eternkompata, mia sola amo, vi, la sola sankt' !
Vi, kiu per ĉarmoj kaj senmort' plenigis la soifan koron de Grand-Zoroastr',
Jen la mia ankaŭ, kiel ĝerm', soifas ; la purpuran vinon verŝu do en ĝin !
Vi, senfunda taso de eterna gloro kaj senmorta ĝuo de la ebriiĝ',
Vi, senfunda taso, plena de senmorta vino de la ĉarmo, ravo kaj diboĉ',
Do min ebriigu, do min ebriigu, per senmorta vino ebriigu min,
Por ke mi forgesu l' homojn kaj dolorojn, la malbonon, trompon, ĉion ĝis
[etern'.

---

1) *Saluton.* — G. S.

Vi, diboĉo granda, vi, milobla festo, vi, la sole sankta, vi, bonkora sun',
Brava batalanto kontraŭ la mallumoj, vi, pli granda forto ol eĉ dio mem,
Vi per feliĉeco via, eterneco kaj per via klero ebriigu min!
Ke en lumaj sonĝoj viaj bonodoraj la pasinton plene ekforgesu mi!
Vi, bonulo sola, vi, kompata ĉiam, vi, patrino mia, vi, sola sanktul',
Vi, venkint' de morto, patro de l' printempoj, vi, supermiraklo, vi, sola belul'!
Mi ja vin amegas, mi amegas kore, do vundigu min vi per flamaĵa glav',
Kaj per orharligoj viaj min surkovru kaj per ili varme ekkaresu min,
Kaj ruĝigu sange miajn amajn lipojn pro lumaĵaj kisoj viaj kun la flam'.
La feliĉalportajn brakojn ekdisvolvu, jen al vi rapidas mi kun granda am'.
Do leviĝu miaj bonaj gekameloj, — la poet' sin turnis al la karavan': —
Kaj de sur piedoj viaj ekforskuu polvon abomenan de sklaveca land'.
Ho, en lasta fojo aŭdu mian diron, — homoj malproksimaj, mi malamas vin,
Abomen-malamas viajn religiojn, bonojn kaj malbonojn, same kiel vin!
Vi ja ĉiam forĝas ĉenojn kaj katenojn kaj starigas ĉelojn por la malliber'.
Ho, en lasta fojo mi vin alparolas kaj ne aŭdos vian bruon ĝis etern'.
Kaj jam eksurdiĝu miaj orelaĉoj, por ne aŭdi iom bruon de la mond'
Kaj eterne blinda estu mi por mondo, por ke vin revidi al mi manku pov'.
Iru do, kameloj, dum centjaroj longaj, kaj rapide flugu ĉiam al la sun',
Por ke mi suniĝu kaj eketerniĝu mi en ĝia fajra plej lumaĵa brust'.
Ho, vi, sun', patrino, mia kara panjo, metu ruĝporfiron sur la ŝultr' al mi,
Por ke kun triumfo tra lumgloroj viaj rekte alrapidi povu mi al vi...»

Sepa Surah'o

Kaj kameloj, kvazaŭ boatetoj oraj tra la fajroondoj de la mar-dezert',
Ĉiam antaŭnaĝis kun rapid' al celo, al oraĵ-fajraĵa virga malproksim'.
Kaj eĉ la samumo per flugiloj fajraj ne povus atingi ilin en la kur',
Nek ilian flugon ekatingus sago ekĵetita de la beduin'-sagul'.
El oaz' la palmoj kisojn al li portis de la lumfeinoj de l' fabela dir',
Kisojn kaj karesojn kaj salutojn amajn dolĉe murmuradis en orel' al li,
Sed Abu-Lalao senatente lasis la murmuron ĉarman de la amsalut'
Flugis li senhalte al la suno-celo kaj vizaĝo lia brilis kiel sun'
La dezerto granda, en lumbril' dronante, sub la sunradioj kuŝis jam post li.
Super lia kapo lumvizaĝa suno radiadis ĉarme kun la orharlig'
Kun liberaj bridoj kuris la kameloj ekfreneziĝintaj tra dezerta spac',
Kaj ilia kuro estis flug' sovaĝa de la fajr-ĉevaloj en ĉirkaŭa pac'
Sub radiaj ŝprucoj de la sun-fontano brilis la kameloj tra la tuta voj'
Kaj sonoriletoj forte sonoradis dum balanca kuro de la kamelar'
Kun porfir' orŝaŭma sur majestaj ŝultroj Abu-Mahario flugis kun triumf'.
Flugis li sendorme, flugis li senlace al la sun' celata, al senmorta sun'.

FINO

El armena lingvo tradukis

G. SEVAK (Erivan).

JANKO, LA JUNPIONIRO

L. IVN

I.

La klubo de Lenin estas ne granda,
Sed ĝi lumas al granda foro.
Ruĝa stelo radias per siaj randoj,
Kiel okul' semafora.

Janko kuras al ĝi je la kvara,
Ne fininte tagmanĝi ankoraŭ.
Janko estas plenaĝa (dekjara!),
Ĉu li havas liberan horon?

Jam li gvidas ĉeneron «Tornisto»
Kaj respondas por tuta afero.
Kiel Lenin li estu persista,
Kiel Lenin li serĉu la veron!

La voĉo de l' knabo vibras
(Tremanta folio metala),
Kiam patose, laŭlibre
Li prelegas pri klasa batalo.

II.

Tiun tagon batalon ne klasan,
Priparolis lia ĉener'.
Estis tasko: fari kompason
Por iri al step' en somer'.

Finvenkinte nadlon obstinan
(Ĝi ne volis montri al nord'),
Oni legis pri viv' en uzino
De fama riĉulo Ford.

Kaj rezultis decido: Ford for
De tiu uzino iru.
Proletara estu ord!
Tion helpu, junpioniroj!

III.

En salonon de l' klub' je la sepa
Janko venis lumbildojn rigardi,
Kaj li vidas: malhela krepo
Serpentumas sur ruĝaj standardoj.

Super sceno laŭlonge pendas
Rubando de nigra plakato,
Kaj radie alvokon ĝi sendas:
«Ni helpu al niaj fratoj!»

Sur la scenon eliris viro,
Levis manon, komencis paroli.
Kaj neniu el junpioniroj
Kuraĝis iel petoli.

Ja ree en Bulgario
Tremigas fenestrojn kaj murojn
Popolaj ĝemantaj krioj
Pro fiaj mortpafoj, torturoj.

Pendigiloj, kiel arbaroj,
Elkreskas en tuta lando,
En sango laboristara
Ĝezbendas faŝista bando.

Sed kial do, kial, kial
(Sulkigas la frunton Janko)
Neniu protestos tiel,
Ke foriĝu por ĉiam Cankov?

Kial do ĉiuj tremas
Antaŭ tiuj burĝaj viperoj,
Anstataŭ ilin subpremi
Kaj ĉesigi siajn suferojn?

IV.

Pasis tago. Vesperon sekvantan
La ĉenero « Tornisto » plendis,
Ke Jankon, sian gvidanton
Oni vane kaj longe atendis.

Li forestis ne nur je la kvara,
Li ne venis la klubon tute.
Kaj hejme tremis ĉe porda knaro
La patrino ĉiuminute.

V.

Post dek tagoj revenis Janko
Kun rigardo malgaja, rigida,
Sen dekstra ĉemiza flanko,
Sen sonora kutima rido.

« Kie estis vi, vaga nubo? »
La patro prenis rimenon.
« Mi ĝisiris larĝan Danubon! »
Respondis la knabo svene.

« Mi deziris en Cankov-landon
Veni por helpi la fratojn.
Mi deziris per propagando
Ribeligi la subprematojn.

VI.

Postkiam Besarabion
Mi venis en eta ŝalupo,
Min tuj persekutis rabiaj
Rumanaj ĝendarmoj-lupoj.

Mi forkuris Tatar-Bunaron,
Kie centoj estis pafitas,
Mi trapasis plencindran kamparon
Kaj vilaĝojn plendetruistajn.

Ĉe Danubo ĝendarmoj min kaptis,
En malluma karcero torturis,
Dum esploro per vipo baptis
Kaj rompi la krurojn ĵuris.

Sed nokte mia najbaro
Priparolis kun gardosoldato.
Ni triope veturis sur maro
Al Odessa en vel-boato. »

VII.

Janko ĉesis, kaj ree li pensas
Pri sia dolora demando:
Kial do, kial ne penas
Liberiĝi sklavar' ĉiulanda?

Ne solvinte tion sukcese,
Li petas pri tiuj duboj
Skribi al li laŭ adreso:
Odessa, Slobodka, Klubo.

Postnoto de l' aŭtoro: La suĵeto de l' poemo estas bazita sur vere okazinta fakto.



B A T A L O (*)

Hristo BOTEV

Juneco en ĉagrenoj foriras,
kolera kuras sango, deliras
mi kvazaŭ... Vane mens' vidi penas,
ĉu bono aŭ malbono alvenas...
Pasinto nigra kuŝas en koro,
ripetas ĝin malica memoro.
En brusto velkas amo kaj vero,
elveki homon mortis espero —
ĉu revekiĝus iu bravulo?
Bravulon pensas ni frenezulo,
friponon oni ĉie estimas:
« Li riĉas » diri oni kutimas.
Riĉulo, fratoj, vivan bruligas
orfaron, rabas, enkatenigas,
kaj ofte staras antaŭ l' altaro
por trompi vin per sia preĝaro.
Kaj tiun hom-premulon inspiras
la eklezi', kaj pastroj admiras,
kaj instruisto filozofias,
al gazetisto kunharmonias
ke timi Dion *estas komenco*
de la saĝeco... Sklava sentenco!
Ja ŝafofelaj lupoj ĝin diris, —
sankcii la katenojn deziras,
subpremi iun senton kaj penson,
kaj enkateni homan la menson.
Tiran' Salomono, diboĉe sprita,
en paradizon ien sendita
kun sentencaro sia la stulta
sentencon diris inter la multa,
kaj vivas ĝi en ĉies animo:
« Timu je Dio, reĝon estimu! »
Sankta stultaĵ'! Cent jarojn batalas
kontraŭ ĝi menso kaj konscienco,
bravuloj ĉiam falis kaj falas,
sed kion faris? Vivon sen senco
popol' trenadas, — morte suferas,
kviete la premulojn toleras,
kisadas de l' fripono la manon
kaj kredas la trompantan tiranon:
se oni vin batas — preĝu, silentu,
kaj lupo se vin mordas, popolo,
se sangon vian suĉas serpento, —
preĝadu: Dia volas ĝin volo:
« Ho Dio, min pekulon pardonu! » —
por ke li punon al vi ne donu.
Tiel mond' iras! Sklavec', malvero
regas nun sur tuta la tero
kaj estas sklava ja testamento
dum ĉiu malfeliĉa momento...
En tiu regno de la perfido,
de malĉastado, sangoj, insido, —
senlima regno de la malbono —
batalo bolas; iras kun sono
al sia fin' sankta... ĝis al la tiran'
ekkrios ni: « kuglo aŭ pan'! »

El bulgara: J. D.

(*) Ni presigas tiun ĉi poemon de Hristo Botev okaze de la 50-jara datreveno post lia morto, malgraŭ ke ĝi ekzistas jam en alia traduko esperanta kaj eĉ estas trovebla en la « Proletaria Kantaro », eldonita de SAT-Kooperativo, kun la muziko.



KRITIKO



HRISTO BOTEV

STEBEK

La 2-an de Junio 1926 j. estis la 50-jara datreveno de la morto de la ne nur nacie, sed ankaŭ monde signifa bulgara poeto kaj revoluciulo — Hristo Botev.

Li naskiĝis la 25-an de Decembro 1847 en la subbalkana urbeto Kalofer. Lia patro, estante instruisto kaj tre klera por sia tempo homo, rimarkis ke lia naskurbeto estas malvasta por lia ribela spirito kaj malkvieta karaktero kaj ke li povas kaŭzi al ĝi malkvietaĵojn antaŭ la turkoj, — sub kies jugo estis tiam Bulgario — pro tio li sendis lin Rusion, en Odesa, por studi en tiea gimnazio. Sed Botev ne restis tie multe. Ne por li estis la gimnaziaj muroj. Li — ektroviĝinte en Rusio en la dua duono de la 60-aj jaroj, la plej interesa jardeko, la komenco de la plej brila periodo en la vivo kaj la historio de Rusio, enfalinta sub la influo de Dobroluvor, Ĉerniŝevski, Pisarev, Hercen, Bakunin kaj aliaj,— pro diversaj kaŭzoj devis forlasi Odesa'n. Li estiĝis instruisto en Besarabia vilaĝo Znamenka, de kie revenis en sian naskurbeton post kelka tempo. Tie li komencis prediki kontraŭ la turkoj kaj «ĉorbaĝi»-oj (1). Li kolektadis ĉirkaŭ si junulojn, al kiuj li instruadis socialismon. Lia patro estis devigita ree sendi lin Rusion por studi en la universitato. Sed anstataŭ iri en ĝin, li restis en Rumanio. Tie li konatiĝis kun la pioniroj de la bulgara liberiga movado nacia kaj fordonis sin per siaj tutaj fortoj kaj entuziasmo je la servo de la revolucio. Komenciĝis vagado de urbo al urbo, persekutado de la polico, malsatado, malsanado, mizerado, aventuroj. Ĉiel li laboris por la revolucio, eldonadis ĵurnalojn: Zname (Standardo), Duma (Parolo), Budilnik (Vekigilo), estiĝis ano de la Revolucia komitato kaj savis la organizaĵon de la malbona situacio, en kiun ĝi enfalis post la morto de la alia granda revoluciulo Vasil Levski. Unuvorte li estiĝis la animo de la movado, li estis la plej amata kaj la plej malamata homo. Tiutempe en Bulgario okazis la granda aprila ribelo 1876. Vidante la plej konvenan momenton, li kolektis ĉirkaŭ si 200 ribelantojn kaj per la aŭstria vaporŝipo «Radecki» en kiun ili eniris el di-

(1) Tiamaj bulgaraj aŭtoritatuloj — riĉuloj, en sia plej granda parto estis kontraŭ la liberigo de Bulgario.

versaj urboj de la rumana bordo kaj kiun ili heroe almilitis dum la veturado sur Danubo, kun ili li atingis la bulgaran bordon kaj elŝipiĝis ĉe vilaĝo Kozluduj. La bando direktis sin al la Balkano. Komenciĝis batalo kontraŭ la turka militistaro. Vane Botev atendis helpon de la proksima balkana urbo Vratza, kiel promesis al li Stojan Zaimov (1), kies devo estis tio. Tiu perfido malesperigis la bandanojn. La senegala batalo daŭris ĝiskiam plej poste turka kuglo traboris la koron de la granda poeto, la 2-an de Junio 1876, sur la balkana supro « Vola ».

Tiel mortis Botev. Tro juna li mortis — nur 29 jara, sed se li estus ĝisvivinta la liberigon de Bulgario, certe pli poste la bulgara burĝaro estus farinta la samon.

Kia estas Botev? Al kiu li apartenas? — Jen estas la ĉiamaj demandoj por diskutado, kiam oni parolas pri li. La burĝaro, konkludante el tio, ke li mortis por la libero de Bulgario, kriaĉas en sia impertinenteco: « Li estas nia — li estas kiel ni — patrioto! » Vere, Botev mortis por Bulgario, kiun li amegis, sed li havas nenion komunan kun la nunaj fipatriotoj, kiuj igas la popolamasojn malami sin kaj buĉadi en la tranĉeoj, dume « la patriotoj » kiel diversaj oficistoj kaj ĉefuloj rabegas malantaŭ ili. Li deziris ne nur politikan, sed ankaŭ socialan liberigon de Bulgario kaj de la aliaj popoloj, kiujn li egale amis. Jen kion li skribas la 1-an de Majo 1875 en la eldonita de li en Bukureŝto ĵurnalo « Standardo »: « ... Nur la racia kaj frateca unuiĝo inter la nacioj povas forigi la suferojn, la malriĉecon kaj la parazitojn en la homa gento, kaj nur ĉi-unuiĝo povas enkonduki veran liberon, fratecon, egalecon kaj feliĉon sur la terglobo. Ĝiskiam la popoloj estos dividitaj inter si per la fimanipuladoj de siaj ĉiaspecaj imperioj, konstitucioj kaj respublikoj, kaj ĝis kiam ili el blinda humiliĝo al la diaj baptitoj rigardas nun al la aliaj kiel malamikoj, ĝistiam ne estos feliĉo sur la tero, ne estos hela tago por la homo... » Tio sufiĉas por montri la veran vizaĝon de Botev kaj al kiuj li apartenas.

Kiel poeto, Botev ĝis nun estas atingita de neniu en Bulgario. En lia poezia trezorejo estas nur *dudek* versaĵoj. Tro malmultnombraj, sed sufiĉege. En ili respeguliĝas lia tuta animo — abismo. Per la sango de sia koro ilin li skribis. Granda amo al la subjuge ĝemanta kaj suferanta bulgara popolo kaj al la tuta homaro; malamego al ĉiuj premantoj tutmondaj kaj al la falsaj patriotoj; deziro renversi la nunan sociordon, forigi la tiranojn kaj fari la mizerulojn mastroj de tiu mondo; detruitaj junecaj revoj kaj vivo, perdita juneco;

---

(1) Tiu perfidulo ankoraŭ vivas — estas direktoro de la parkoj kaj muzeoj en Pleven.

forĵeto de la amo antaŭ la devo por batalo; senlima amego al la libero — jen ĉio ĉi trovis esprimon en liaj malmultaj, sed ardaj versoj.

Per sia vivo li similas nur la poetojn Lermontov kaj Petõfi, sed anstataŭ vidi en sia morto sian finon, kiel ili, li vidas sian eternan vivon kaj gloron:

« ... Ja kiu falas por la Libero
neniam mortas! Pro li ekploras
naturo, besto, nubo kaj tero
kaj bardoj mira-kante lin gloras... » (1)

Kion li skribis, li efektivigis, — sian tutan vivon li dediĉis al la batalo por libero. Por la libero li estis preta je ĉio — kaj li mortis por ĝi.

Botev ne estas mortinta — eterne li vivos en niaj animoj. Lia granda spirito montros al ni la veran vojon, al ni, kiuj deziregas, ke regu en la mondo libero, frateco, egaleco kaj feliĉo. Liaj versoj kaj artikoloj estas la standardo, kiun devas teni ĉiu liberon sopiranta homo kaj batali sub ĝi.

SIBERIA LULKANTO

PRI LA ROMANO « VIKTIMOJ » DE JULIO BAGHY

N. V. NEKRASOV

La jaroj 1915-1918... Mondmilito imperialista... En ĉiuj militantaj landoj — ŝovinistaj hura-humoroj de la socia surfaco kaj latente kreskanta malkontento de la laborularo... Mizeriĝanta bonstato de la popolo... Sango kaj teruro sur la batalfrontoj... Kaj en malproksimaj profundoj de la internaj landoj — tendaroj de malfeliĉaj militviktimoj — la militkaptitoj...

La vivo de militkaptitoj — brutare pelataj hommasoj — traktataj kiel « malamikoj », nur pro kompato ĝuantaj mizeran vivaĉon — terura stato! Multaj miloj da homoj ĝin eltoleris ĝis fino. Duono mortis.

En grandaj grizaj barakoj de germanaj tendaroj por francoj, angloj kaj rusoj, en francaj tendaroj por germanoj, en malproksimegaj siberiaj tendaroj por aŭstro-germanaj militkaptitoj, eĉ en holandaj tendaroj por belgaj internigitoj kaj en polaj tendaroj por kaptitoj el la revolucia ruĝa armeo

(1) El la versaĵo « Haĝi Dimitro » — traduko de J. D.

bolŝevika — ĉie, ĉie pulsis kun spita intenseco la subpremita homa vivo, kaj multaloke sola konsolo estis nur studado de Esperanto. La vegetinta en la koroj espero kroĉis sin al tiu pala fikcio kaj en griza prematmosfero burĝonis helaj revoj kaj songôj pri la internacia homarfrateco.

Tiu ĉi speciala temo trovis sian esprimon jam en la unua libro de l' esperantista poeto Julio Baghy, « Preter la vivo ». La milito trudis al li la malfeliĉan sorton esti militkaptita de la rusoj el la aŭstro-hungara armeo kaj ĵetis lin al ekstrem-orienta Siberio. Tie, alkroĉita al la tendaro, li pasigis en frosto kaj malvarmo longajn sopirajn tagojn, laŭvere la vivo estis pasanta kvazaŭ pretere, ĝis fine post la revolucio kaj post aliaj plej diversaj politikaj perturboj ebliĝis reveno al la patrolando.

La specialaj kondiĉoj de tiu siberia restado, la neĝaj kampoj de tiu norda landego, reflektaĵoj el tiutempaj politikaj okazaĵoj trovis revokon en la versoj de Julio Baghy. La libro « Preter la vivo » malfermiĝas mem per jena « Siberia romanco » :

Sur blindaj voj'
de l' neĝa kamp',
kie vagadas lupoj,
kun kormalĝoj'
per pena ramp'
marŝas mizera trupo...
La vestojn ŝiras frosta vent'...
La korojn tordas larma sent'...
Super la kapoj korvoj krias...
La korvoj krias...

Jen iras la militkaptitoj... Terura bildo, kiu impresas kiel frosto ! Ankoraŭ pli teruraj revenas bildoj de rememoro pri la perdita hejmo... Jen konversacio « Inter kaptitoj » :

« Kial vi ploras, samsortan' ?
Ĉu vin turmentas la malsan' ? »
« Ne ! La ekstera vintra frost'
sin trapenetris ĝis la ost'...
Pro la glacia spir-nebul'
larmas silente la okul'... »

« Strange ! La fajro en la forn'
varme nin lulas nun al dorm' ! »
« Pravas vi ! Penson pri mizer'
portas mi larme kun sufer',
ĉar hejme vokas min infan',
eble malsana nun, sen pan'... »

Frostego ekstera kaj frostego interna. Unu pli terura ol la alia... Falas neĝo. Blovas ekstere frosta vento kun bleko kaj siblo. Ĉe brulanta forno en sia barako sidas ili, la militkaptitoj, kaj elekstere la vento siberia, lulante ilin al dormo, kantas sian teruran lulkanton :

Brue skue blekas vento,
knaras ligna dom'...
Ĝeme treme sin forkaŝas
besto kaj la hom'...
Vent' alportas sangan krion
tra l' glacia neĝa val'...

Estas sanga krio de la rusa revolucio, popola ribelo kontraŭ la milito kaj mizero. Ekstere la vivo, la kruda vivo bolas. Okazas grandiozaj histori-renversoj. La popola volo konkiras la potencon, instaliĝas la ruĝa reĝimo de la laborista-kamparana diktaturo. Sed ne por longa tempo.

Prude krude fremdaj homoj
venas el insid'...
Trompe rompe sangtriumfe
venkas la perfid' ...

La internaciista revolucio, kiu kuraĝe deklaris batalon por la paco tutmonda, per stranga historia paradokso ricevas perfidfrapon en la dorson. Eks-militkaptitoj ĉeĥoslovakaj, mobilizitaj antaŭ la revolucio kaj inspiritaj naciiste por batali kontraŭ Germanio, intervenas en la revolucion sur la flanko de la blankuloj, helpas la Entento kaj la ruĝa reĝimo falas.

...Ĉeĥaj legioj pasis orienten por bori al si tra malamika bajonetarbaro vojon al hejmreveno. Ili estis iloj en la mano de reakcio. Viktimoj, kiuj milope mortis por fremdaj interesoj. Ilian patriotismon profitis la sinsekvaj reĝimoj.

Komenciĝas la jaro 1919. Terura jaro, jaro de la furiozanta reakcio. Kontraŭrevolucio antaŭenmarŝas, regas la blanka teroro.

En impresiga poeziaĵo «1919» Julio Baghy priskribas tiun teruran jaron per unu neforgesebla bildo de pafmortigo dum vintra nokto.

Silento. Neĝo. Nuba vualo. Soldata blasfemo. Patro kun infano estas veturigataj al la morto. Rajdantaj kozakoj. Lasta funebra kordono. La patro fosas. Soldato kun aplombo legas pormortan verdikton de la stabo — «Je nomo de la leĝo!» Kaj la responda ekkrio de l' patro, kiu profetas eternan tombon al la nun triumfanta reakcio.

Mallonga preĝo... Je kri' de l' komando...
Subite ektondras la paf' post moment'...
Du sangaj korpoj enfalas de l' rando
Kaj... ĉion surkovras la neĝa silent'...

Ĝismorte neforgeseblajn bildojn vidis Baghy en Siberio. Ili donis al li bonajn vivlecionojn. Li scias kompreni sencon de multaj aferoj kaj ĝuste trovi la kaŭzon.

Kiel profunde, kiel trafe Baghy sukcesas kapti psikologian diferencon de du diversaj karakteroj montras al ni, ekzemple, malgranda versaĵeto «Ĉe samovaro»:

Ĉe malnova samovaro
Sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo zume bolas,
La amikoj ekparolas.

«Havi landon en libero,
Tamen migri tra la tero,
Iri vojon, sed sencelan...
Ĉu vi konas pli kruelan?»

La hungaro ne respondas,
Liaj pensoj ĝeme ondas,
Viŝas larmon retenitan.
« Havi landon, sed perditan... »

Ĉe malnova samovaro
Sidas ruso kaj hungaro.
Dum la akvo bolas zume,
Ili ploras... ploras kune.

Baghy revenis al sia « perdita lando »... kaj skribis serion da versoj sub ĝenerala titolo « Ĉe la ruinoj ». Tre klare! « Melankolio », « Preĝo sur la strato », « En la drinkejo », « Turmentaj demandoj », jen estas la versoj, verkitaj de Baghy hejme en Budapeŝto.

Turmentaj sociproblemoj, socia mizero, maljustaĵoj sociaj, pesimismo ĵetiĝas en menson de la poeto. Sed Baghy ne estas homo de la politiko. Ja filistreca individualismo metas malfreŝan stampon sur la politikajn filozofiaĵojn de Baghy. Mankas al li konsekvenco por, unufoje konstatinte fakton, fari certajn neeviteblajn konkludojn.

La individualismo de Baghy kreis al li opinion, ke li estas iu aparta « mondvagabondo », kiu vagas « preter la vivo ». Kiel « mondvagabondo » li iras tra la mondo kaj « neŭtrale »(?) observas la vivon, ĝiajn tragedietojn kaj komedietojn. Filozofe li deklaras: « Ĉio estas vanta ». Kaj en sia versaĵo « Revoluciaj dioj » konkludas (eĉ kursivlitere): *« ... nur batalo estas destin' de homa sort' ! »*

En tiu ĉi pesimisma sentenco de Baghy kuŝas granda nekredemo al la revolucia batalo de subpremita sklavaro por siaj rajtoj. Laŭ Baghy, tiu ĉi batalo — « destin' de homa sort' » — promesas ĉiam nur ŝajnan « edenon », sed « poste, glazuron perdinte, ĝi fariĝas senpova »... Anstataŭ la detruita instaliĝas nova di-idolo, kaj la historio rekomenciĝas denove.

Tia « filozofio » ne faras honoron al Baghy. Ĝi kondamnas al pasiveco, al individualismo, al malprogresado...

En tiu ĉi problemo Baghy mem fariĝas « senpova » plej ekstreme.

Tute vane Baghy filozofias, ĉar kiam li tion ne faras, li atingas per nura instinkto, per ia natura logiko superajn formojn de vera konsekvenco. Ĉu povas esti io pli logika, pli konsekvenca, ol la admirinda klareco de la perfekta poemo de Baghy, « Krioj de l' mizero ! » La energiajn strofojn de tiu ĉi belega poemo, saturita per malfalsa indigno, kolero kaj malamo, ĉiu esperantisto-proletario devas nepre scii parkere !

Tamen ne ĉiam Baghy leviĝas sur tian altan nivelon. Ordinare lin ĉirkaŭas malsaneca atmosfero de dandismo. La arto, kiun Baghy servas, ofte kondukas lin en fermitan rondon de spirita aristokratismo. Tro multan tempon Baghy dediĉas bedaŭrinde al « amo ».

Sed oni devas alte taksi la fakton, ke el tiu speciala rondo Baghy kuraĝas eliri. Li revenas, li perfidas, sed la Siberia spiritheredaĵo manifestiĝas.

« En horo de l' malespero » Baghy faras viziton ĉe Lia Reĝa Moŝto « La Mono ». Ironie li riverencas antaŭ la « Granda Sinjoro, sidanta en velura seĝo » kaj prezentas demandon :

Kial Vi fermas time la palpebrojn ?
Ĉu Vi ne povas vidi la funebrojn
de Viaj turmentitoj ?
Ĉu el okuloj miaj ĉi sangflamo,
fajre brulanta rememor' pri l' dramo
de mil militkaptitoj
nun turmentas Vin ?
Ne atentu ĝin!...
Ĝi estas sole rememoro
el tero larma de l' doloro.

En barakoj
post najlitaj pordoj
blekis mortakordoj
de mil homoj bruligitaj
kaj vive oferitaj
por la gloro via,
ho Sinjor' rabia,
de l' kozakoj !
. . . .
. . . .

Kiel ia malbenita inkubo renaskiĝas en ĉiuj detaloj la fatala rememoro pri Siberio. En la animo vekiĝas sonoj de la muziko, kiujn lulis ventego siberia en la malvarmega norda vintro. Ekpinĉas la koron stranga nostalgio... je fremda lando.


La kant' de l' vintro muĝas nur
en ventsiblado kun murmur'...
Rakontas ĝi pri larm', sufer',
pri detruitaj rev', esper',
pri krimoj de l' militkruel'
kaj sangaj tagoj de l' ribel'...

Veadas en ĝi : kri' de l' mort'
Ĉielon blasfemanta vort'
kaj ploras en ĝi kun sopir'
infanojn orfiganta spir'...
Ho dio, tamen je Siberi'
min kial premas la nostalgi' ? !

Tiu ĉi profunda sopiro pri Siberio, tiom dolor- kaj terur-plena (ĉu ĝi ne simbolas la tutan mondbatalon socian ?), igis Julion Baghy verki romanon el la vivo de Siberiaj militkapt-itoj sub la titolo « Viktimoj », kiu aperis presita antaŭnelonge.

(Daŭrigota.)





 ARTO 

Vizaĝoj kaj Naturo

EL KINO-ARTO

G. DEM.

Laborista urbeto. Vivon al ĝi donas grandega uzino. Ĉi vivon gardas policano — grandega kun pezaj botoj, kun peza ĉapo.

Laboristo *Vlasov* perdis la ĝustan vojon. Li malsanas per drinkemo. Sub pezo de liaj batoj kurbiĝis lia laborema edzino — *la patrino* de Paŭlo. Paŭlo ne similas la patron. Malbrua kaj hela, li partoprenas nelegalan revolucian movadon. Studentino alportis revolverojn, por ke li kaŝu ĝis necesa momento. Supozante ke la patrino dormas, Paŭlo kaŝas ilin sub planko. Sed la patrino rimarkas kaj en foresto de Paŭlo esploras, el kio konsistos la kaŝitaĵo.

En fumplena drinkejo « ripozas » laboristoj. En ebria ĥaladzo klopodas provokisto kaj « nigra cento » (batalbando monarkista en cara Rusio) pri siaj aferaĉoj. Ebria *Vlasov* alportas gladilon por ŝanĝi ĝin kontraŭ glaseto da brando. La vendisto ne konsentas kaj Vlasov estas preta mortigi lin, kiam la provokisto ŝovas la glaseton, regalante per brando. Vlasov drinkas kaj trafas en la retojn de l' nigra cento. Li nun estas ilia.

La nigra cento aranĝas embuskon por organizantoj de uzina striko. Ŝlos-



inte la uzinan pordegon, armitaj nigracentuloj atakas la strikantojn. Forkurantan Paŭlon penas kapti la ebria, bestiĝinta patro. Paŭlo kun sia K-do savas sin en la drinkejo. Sed la nigracentuloj penetras tien. Batalo, dum kiu Paŭlo forkuras kaj la patro estas hazarde mortigita.

La kadavron de l' mortinta edzo oni alportas al la patrino. Humile preĝas la silentema patrino. Najbarinoj malice komunikas, ke la patron mortigis « Socialistoj » — la kamaradoj de Paŭlo.

Revenas Paŭlo por forporti la revolverojn, sed la patrino ne lasas al li tion fari — ŝi timas ke ankaŭ Paŭlon oni mortigos. Tiu momente aperas polico, al kiu estis denuncitaj ĉiuj organizintoj de la striko. La esplor-serĉo pasas senrezulte, tamen oni arestas Paŭlon. Nenion komprenanta patrino demandas : « Pro kio, sinjoro oficiro ? » — « Li konfesu sian kulpon, tiam ni ĉion pardonos — responde ĵetas la oficiro. La patrino ekfidis al li. Ŝi prenas la revolverojn el sub la planko kaj donas ilin al la oficiro, per tio aĉetante liberon por la filo. La oficiro, ricevinte kion li bezonis kaj serĉis, batas Paŭlon, ĝis la sango aperas sur liaj lipoj. Paŭlo estas forkondukata. Kaj la patrino, nenion komprenante, restas kun tremanta atendita mano: « Sinjor' oficiro, sinjor' oficiro... ».

Cara juĝo — « severa, justa kaj favora » — diras sian verdikton : punlabora malliberejo. Aŭdinte tion, la patrino ekkrias en la juĝsalono : « Kie do estas la vero ? ! » Kaj ekkonsciinte sian perfidon, ŝi krias al la forveturigata filo : « Pardonu, Paŭlĉjo ! »

Printempo bruas. Paŭlo estas en malliberejo. Lin vizitas la patrino, la renaskiĝanta patrino. Sentime ŝi transdonas al li skribaĵeton : dum promenado li devas forkuri. Ĉio estas aranĝita por la forkuro. Ĝi devas okazi dum unuamaja demonstrado.

Ĝoje oni flustras en la malliberejo : « Laboristoj venos liberigi ». Oni flustras ankaŭ en la kabineto de policestro — pri la demonstrado, kiun necesas subpremi.

Laborista junularo iras al la demonstrado. Kun ili — la patrino.

Vastonde, kiel brua printempa rivera glaciiro, marŝas la demonstrantaro al la malliberejo. La patrino — en la unuaj vicoj.

Kaj en la malliberejo tiuhore okazas promenado de l' enkarcerigitoj. Sed oni ordonas ĉesigi la promenadon. La enkarcerigitoj ribelas. Rapidas gardtaĉmento por subpremi la ribelon. Falas pafmortigatoj. Tumulto. Kelkaj forkuras. Inter ili Paŭlo. Sed lin rimarkas gardisto, postkuras lin. Antaŭ Paŭlo — glaciiranta rivero. Paŭlo saltas sur glacipecon kaj, malgraŭ samtempe ricevita pafvundo, rampante de unu glacipecon al la alia atingas la kontraŭan bordon, kien jam alvenis la demonstrantaro. Ĝoja renkonto de l' filo kun la patrino — ili nun ambaŭ por la sama vero batalas.

La polico ne dormas. Renkonte al la demonstrantaro — kavaleria taĉmento. Salvo. Falas mortigitaj standardisto de l' demonstrantoj kaj apud li — Paŭlo. La mortan lin ĉirkaŭprenas la patrino. Poste leviĝas ŝi, prenas la standardon kaj iras antaŭen, sola, per sia silento kriante: « Kie estas la vero ? »

Galopas en atako la taĉmento. Kaj sub ĉevalhufoj pereas, kun ruĝa standardo en la manoj, la patrino, eksciinta kie estas la vero....



Tia estas, pruntita el romano de M. Gorkij « La patrino », la suĵeto de nova sovetia filmo, havanta la saman nomon — « La patrino ». Kiel povas konstati la leganto, en tiu suĵeto, simile al la « Kirasŝipo Potjómkin », mankas ajna am-intrigo. Kaj malgraŭ tio streĉas vian atenton la filmo dum spektado — ĝis la lasta momento, ĝis la lasta bildo. Ankoraŭ io estas karakteriza por la filmo — mankas en ĝi artefariteco — oni vidas tute simplan laboristan urbeton kaj ĝian vivon sen ajnaj plibeligoj, ornamaĵoj. Ne estas uzataj ankaŭ iuj specifaj kino-artifikaĵoj. Ne, la spektanto vidas ĉiam nur fotografaĵon, klaran fotografaĵon de la vivo. Kaj tamen la impreso estas granda. Vin logas la bildo de l' patrino, vi estas preta leviĝi de via sidloko por kuri renkonten al ŝi, sub ŝian ruĝan standardon.

Kaj samtempe kreskas ĉe vi malamego kontraŭ tiu reĝimo, kiu tiel perfekte estas prezentita en la filmo per la simbola, sed viveca figuro de grandega, perbota policano, gardanta la vivon.

Tiurilate, la emocioj, kiujn donas al spektanto la filmo, egalas al tiuj kiuj eksplode naskiĝas dum spektado de « Kirasŝipo Potjomkin ». Estas interese tial kompari la metodojn, uzitajn en ambaŭ filmoj.

« Potjomkin », migranta malgraŭ cenzuraj malpermesoj preskaŭ tra la tuta Eŭropo, uzas objektojn, inter ili ankaŭ homojn kiel objektojn, por krei emocion ĉe spektantaro. Kiu vidis tiun filmon, rememoru la nervecan ŝovadon de krucifikso en la manoj de l' ŝipa pastro dum la sceno, kiam estas preparata mortpafado de maristoj — la movoj de l' krucifikso kvazaŭ celas rapidigi la preparadon. Aŭ la tukon, movetigatan de la vento — ŝajnas ke sub ĝi kuŝas la korpoj de la mortpafitoj. Aŭ la infankaleŝon, kiam ĝi rulas de sur la kaja ŝtuparo. Aŭ la rompitan okulvitron de l' vundita en okulon virino. Aŭ, fine, ruĝan flagon sur la masto. Ĉio ĉi, estante apartaj etaj detaloj, kreskigas ion bolantan en vi ĝis tia grado, ke vi pretas eksalti de sur via loko, por eniĝi, plena je entuziasmo kaj malamego en la batalon kontraŭ

la sistemo, kies soldataj botoj (vi vidas nur la piedojn!) premas la mortpafatan loĝantaron sur Odessa ŝtuparego....

« Potjomkin » uzas objektojn ankaŭ por rakonti. Rememoru la bildojn de l' ŝipa maŝino, kiam estas bilde rakontata la kurego de « Potjomkin » renkonten al la cara ŝiparo, ĝin atakonta. La rapideco de l' ŝipkuro estas transdonata per apartaj bildoj de rapide moviĝantaj maŝinpartoj, per ondŝaŭmado ĉirkaŭ la ŝipo.

« Potjomkin » do uzas objektojn kiel aŭtorojn.

« La patrino » atingas same sukcesan rezulton per alia metodo. Ĝi utiligas plene aktoron-homon, ĝi rakontas per *vizaĝoj* de homoj.

La tuta historio de l' patrina perfido kontraŭ la filo, farata pro la patrineca amo al li, kaj de ŝia renaskiĝo, revoluciiĝo estas rakontata per la vizaĝo de l' patrino. Jen tiu suferplena vizaĝo de laboristino, kiam ŝin batas ebria edzo. Kaj jen ĝi, plena je esprimo de pacienco kaj suferego, kun larmoj rulantaj el la okuloj kaj kun la lipoj kunpremitaj, kiam ŝi sidas apud la ĉerko de sia edzo. Kaj la seriozeco, esprimo de graveco en la ago plenumata, kiam ŝi en malliberejo transdonas sekrete skribaĵeton al la filo. Kaj la ĝojo de batalpreteco, kiam ŝi iras en la unua vico de l' demonstrantoj. Kaj la plena sinforgeso, la decideco porbatala, ignorado de morto, kiam ŝi leviĝas apud la mortigita filo, prenas la standardon kaj firmapaŝe iras antaŭen, la sola, renkonten al la galopanta taĉmento. Tiu vizaĝo rakontas eble pli, ol multaj majstrecaj paĝoj de Gorkij.

Kaj rigardu la vizaĝon de Paŭlo — ĝi estas plena de vivĝojo kaj samtempe ĝi estas simpla laborista vizaĝo, kiun vi ŝajne iam, ie vidis — tiom kutime-konata ĝi estas.

Aŭ jen la vizaĝo de juna soldato, kiu intermite akompanas la tutan scenon de l' patrino vizito al la filo en malliberejo. Kien estas strabitaj liaj okuloj? Kial li ridetas apud la karceraj kradoj? Ne streĉu vian inventemon por diveni — la presata kliŝo, tranĉita el la filma bildo, estas nesufiĉa. Necesas ke vi vidu ankaŭ la blaton, al kiu estas strabitaj la okuloj de l' juna soldato. Li dronigas per fingro ĝin en restaĵoj de supo sur telero kaj ridetas, observante kiel ĝi penas sin savi, kiel ĝi batalas pro la vivo. Li ridetas, konstatante la vivemon kaj la vivdeziron. Kaj vi konstatas en li unu el multaj Paŭloj, sur kiun la reĝimo ŝovis la uniforman ĉapon por enkapigi la uniforman metion de mortigado. Kia do li estas mortigisto — kiam li ĝojas pri la vivemo koj saviĝo de blato!

Sed jen la alia vizaĝo — ĝin vi vidas sama dum la tuta filmo. En ĝi mankas iu ĝojsigno; ĝiaj okuloj elkaŝe observas la viktimon. Tio estas la senhomiĝinta homo — la provokisto.

Same kiel en « Potjomkin » rakontas diversaj objektoj, sed ne aktoroj, same en « La Patrino » rakontas ne aktoroj, sed iliaj vizaĝoj.

La vizaĝoj sin sekvas unu post la alia, plektante la emociigan bildon en ĝia tuteco. Kaj al la esprimforto de tiuj aktoroj helpas bildoj de naturo, intermite aperantaj antaŭ viaj okuloj.

Polico, venanta por aresti Paŭlon. Kaj tuje la strata koto, profunda kaj glita.

Paŭlo en malliberejo. Sur lia vizaĝo, sopiro pri la libero. Kaj tuj sekvas la ekster-malliberejа printempo kun ĝia ĉarmanta belo de freŝa, libera, vekiĝanta post ripozo naturo.



NATURSCIENCO



De kie la suno akiras sian varmon?

Dekmilojn da jaroj staras la suno sur la ĉielo kaj radias sian varmon en la senfinan spacon, laŭ nia scio, per nemalpliiĝinta forto. Nur ekstreme malgrandan parteton, malpli ol miliardonon de la tuta sunvarmo kaptas nia tero, sed ĉi tiu kvanto estus sufiĉa por malfrostigi glacikruston de 30 metroj ĉirkaŭ nia tuta mondglobo.

Laŭ mezuradoj estas la temperaturo sur nia sunsupraĵo 7000 ĝis 8000 gradoj kaj *Helmholz* elkalkulis, ke por kompensi la perdon de varmo, kiun la suno elradias, ĉiuhore 75000 kilogramoj da ŝtonkarbo devus esti bruligataj sur ĉiu kvadratmetro de nia sunsurfaco.

De kie akiras la suno sian varmon? Sen aldoniĝoj ĝi malvarmiĝus 5 ĝis 6 gradoj jare kaj jam delonge ĝi rapidus kiel malvarma korpo tra la glacia, malluma spaco. Je ĉi tiu demando scienculoj de diversaj tempoj donis diversajn respondojn. Komence ili supozis, ke daŭre falas meteoroj sur la sunon kaj ke la kaŭzita de tio skuo kaŭzas tiom da varmo, ke la elradiita varmo estas anstataŭata. Tio ne povas esti vera, ĉar tiam devus la suno ĉiam pligrandiĝi, kio ne okazas. *Helmholz* hipotezis, ke la suno pro malvarmiĝo kuntiriĝas kaj ke ĉi tiu kuntiriĝo estigas tiom da varmo, ke la temperaturo estas egala. Li elkalkulis, ke la diametro bezonas kuntiriĝi (malpligrandiĝi) nur 60 metrojn jare por reestigi la perditan varmon. Sesdek metroj ne estas multo, tio estas en 1000 jaroj dekmilono de la tuta maso, tiel ke, laŭ *Helmholz,* post 20 milionoj da jaroj la suno estus tute kuntiriginta kaj tiam devus la terloĝantoj nur vivi sen ĝi!

Svante Arrhenius donas alian klarigon, kiu permesas al ni rigardi la estontecon iom pli trankvile. Tiu ĉi sveda scienculo supozas, ke kvankam sur la sunsupraĵo ekzistas nur kemiaj elementoj, en la internaĵo de ĝi, kie estas premo de pli ol 8000 milionoj da atmosferoj, ankaŭ estas kunmetitaj

---

Amase, vigle marŝanta demonstrantaro, kiu rapidas al la malliberejo por liberigi enkarcerigitojn, malligi ilin por libera vivo. Kaj apude, la glacio per grandaj pecegoj rapide moviĝanta sur la rivero. Neniu forto kapablas, ŝajne, haltigi ĝian iradon. Sed jen la digo, kontraŭ kiun rompiĝante sursaltas la glacipecoj. Kaj tuje, la kavaleria taĉmento, kiu baras la vojon al la demonstrantaro. Sed la glacipecoj rompiĝante ne pereas, ilin movas lavange la rivero liberiĝanta el longa vintra dormo. Ne pereas ankaŭ la laboristaj lavangoj: post la batala flirtado de ruĝa standardo en la manoj de l' patrino vi vidas venkan flirtadon de l' sama ruĝa standardo sur kremla konstruaĵo en la apoteoza bildo de la filmo.

Pri tiu konkludo imprese parolas vizaĝoj kaj naturo en la filmo.

ŝtofoj. Tiuj ĉi kunmetitaĵoj (komponaĵoj) supreniras sub la treega premo supren kaj malkomponiĝas kun fortegaj eksplodoj, ĉe kio liberiĝas gigantaj kvantoj da energio, t. e. varmo, sufiĉaj por konservigi al la suno ĝian varmon ĝis neantaŭvideblaj tempoj.

Ankaŭ ĉi tio estas supozo, sed la eksplodoj, kiujn oni ne povas imagi, kaj ĉe kiuj la ŝtofoj foje kun rapideco de preskaŭ 1000 kilometroj ĉiusekunde estas ĵetataj en la spacon, estas observitaj per teraj instrumentoj, do jes — iomete atestas por la ĝusteco de la perceptoj de Arrhenius.

Trad. el nederl. lingvo: G. P. DE BRUIN.

Fabrikoj de Nutraĵo

O. DROĴĴIN kaj G. DEMIDJUK

Antaŭ nelonge en speciala kemia gazeto « Journal of Chemical Society » aperis tre interesa artikolo sub la titolo « Sintezo de formaldehido kaj karbonhidratoj el karbonacido kaj akvo ». Malgraŭ la sufiĉe fakecaj titolo kaj temo, la artikolo havas vastan kaj grandan intereson ankaŭ por nefakuloj, ĉar ĝi konigas ekstreme gravajn rezultojn de sciencaj eksperimentoj. Al ili ni dediĉas nian hodiaŭan konversacion. La leganto ne timu : ni ne intencas superŝuti per kemiaj terminoj kaj formuloj. Ni intencas pli simple trakti la temon, komencante per

Vidpunktoj de kuiristino kaj de kemiisto rilate al nutraĵo.

La unua inter diversaj nutraĵ-objektoj, kiujn ŝi havas en sia laboratorio — la kuirejo — distingas viandon diversspecan (bovaĵon, ŝafaĵon, porkaĵon k. t. p.), grion (rizon, poligonon k. al.), farunon, buteron, grasaĵon, sukeron k. t. p.

La dua — kemiisto — faras malpli vastan, sed pli profundan klasifikon. Li distingas (se ni limigos nin per nutraĵoj plant- kaj animal-devenaj) nur la tri ĉefajn specojn — tiel nomatajn albuminojn, grasojn kaj karbonhidratojn. Sub la nomo albuminoj la kemio konceptas apartan specon de komplikaj organikaj ŝtofoj, similaj al ovblanko. En la grupon de grasoj la kemio unuigas diversajn specojn de buteroj kaj grasaĵoj. Fine la grupo de karbonhidratoj, malgraŭ la fakeco de tiu vorto, enhavas tiajn konatajn al ni ŝtofojn, kiel sukero kaj amelo, troviĝanta en faruno, terpomo kaj grio.

Kaj jen sciencaj esploroj evidentigas ke la fundamenta prafonto de ĉi tri kemiaj grupoj de nutro-ŝtofoj estas la plantoj. Nur ili kapablas produkti organikajn ŝtofojn (kaj inter ili la albuminojn, grasojn kaj karbonhidratojn) el la neorganikaj, el la mineralaj. Tial malapero de plantoj sur la terglobo povus venigi al pereo de la tuta animalio. Kaj tial, por kontentigi sian bezonon pri nutraĵoj, la homaro devas kulturi diversajn specojn de plantoj. Tial ĉiujare centmilionoj da homoj fosas per plugoj la teron, semas ĝin, elspezante por tiu laboro multajn-multajn fortojn.

Tiel estis antaŭe, tiel estas nun, sed ĉu estonte okazos same? Ni ne riskus tion aserti. Kontraŭe, nunamomente ni havas seriozan bazon por supozi, ke estonte la produktado de nutraĵoj estos forprenita ĉe la plantoj. Anstataŭ ili specialaj fabrikoj estos okupataj per produktado de

nutraĵo el aero.

Almenaŭ tiel opinias eminenta moderna kemiisto Danielo Berthelot. Jen estas liaj propraj vortoj, diritaj al korespondanto de iu amerika gazeto:

« Mi vidas tian fabrikon funkcianta; ĝi konsistas el aro de apartaj ejoj, ĉiu el kiuj prezentas grandan ĉambron kun malalta plafono. La flanko estos okupita per grandaj vitraj kuvoj. Ĉiu kuvo havos enkondukajn tubojn por enlaso de la gasoj — de la samtiuj gasoj, kiujn utiligas la naturo mem por produktado de plantaj nutraĵoj. Enirante de supre, ĉi gasoj fluos malsupren laŭlonge de la kuvoj. Pendigitaj ĉe la plafono grandegaj lampoj sendos ultra-violajn radiojn. Sub efiko de ĉi radioj la enlasitaj gasoj estos antaŭ niaj okuloj transformiĝantaj en plantaĵajn organikajn ŝtofojn.

En plena silento estos okazanta ĉi granda laboro. Tra la vitrajn vandojn de l' kuvoj ni vidos, kiel en aero estos formiĝantaj subtilaj neĝeblankaj flokoj, malrapide falantaj sur la fundon. Tio estos artefarita amelo, prezentanta precizan reproduktaĵon de la natura amelo.

Ni vidos laboristojn en specialaj vestoj, defendantaj ilin kontraŭ la potenca efiko de l' radioj, kun specialaj okulvitroj, sen kiuj ili dum sekundo blindiĝus. Per specialaj ŝoveliloj la laboristoj kolektas amasiĝantan sur la fundo farunon kaj forfluigas ĝin tra tuboj al malsupra etaĝo, kie barelo post barelo amasiĝas la riĉega rikolto de l' fabriko. En iujn barelojn estas ŝutata amelo, en la aliajn, sukero. La plenaj bareloj estas ekspedataj de la fabriko al fervojoj kaj ŝipoj kaj per la lastaj disportataj tra la mondo. La preciza kontado de l' produktado montros, ke tia fabriko dum unu tago donas pli multe da nutraĵoj, ol ilin produktas granda agrikulturejo dum tuta somero. »


Sed ĉu tio ne estas nur fantaziaĵo, la senbrida, sengrunda fantaziaĵo de granda kemiisto, profesoro, akademiano kaj inĝeniero-elektristo Daniel Berthelot? Malgranda ekskurso en la sciencajn esplorojn pri vivo kaj funkciado de plantoj forigas tiajn dubojn.

La planto, natura fabriko de nutraĵo.

Antaŭe oni opiniis, ke plantoj elsorbas jam pretajn nutraĵojn el la grundo. Sed la sciencaj eksperimentoj jam en 17-a jarcento montris la neĝuston de tia koncepto kaj ke la planto grave partoprenas en produktado de la organikaj ŝtofoj el la mineralaj. Tamen oni ankoraŭ konsideris tiam, ke la ĉefan rolon en ĉi produktado ludis plant-radikoj kaj la rolo de folioj estis nekomprenebla; ili eĉ estis rigardataj kiel senutila ornamaĵo de plantoj. Nur en 18-a jarcento oni pruvis eksperimente, ke la ĉefa nutr-organo de planto estas folio, kiu sub efiko de sunlumo ensorbas la karbonacidon (elspiratan de animaloj) kaj eligas oksigenon (kiu estas necesa al animaloj por spirado). La desegnaĵo (1) montras tiun ĉi interesan eksperimenton: en la vitra glaso troviĝas akvo kun solvita en ĝi karbonacido; en ĝin estas metita akva planto kovrita per funelo, sur kies tub-ekstremon estas surŝovita prov-tubo. En la komenco de l' eksperimento ĉi prov-tubo estas tute plenigita per akvo. Se

nun ni metos la tutan aranĝon sub efikon de sunradioj, ni tuj rimarkos, ke el la planto komencas eliĝi iu gaso, kiu kolektiĝas en la supra parto de l' prov-tubo, iom post iom forigante de tie la akvon. Tiu ĉi gaso estas oksigeno — apenaŭ bruletanta lignaĵo tuj ekflamas en ĝi.

Per pluraj eksperimentoj estis pruvite, ke planto ensorbas karbonacidon el aero eĉ se aero enhavas nur 0.0001 % da karbonacido.



Desegnajo 1.



Desegnajo 2.

Ensorbante karbonacidon, planto — kiel ni ĵus vidis — malkomponas ĝin je karbono kaj oksigeno, eligante la lastan kaj transformante la karbonon en organikajn ŝtofojn. Kiel unua produkto de ĉi transformado aperas formaldehido kaj kiel la fina — amelo, kiu servas kiel nutraĵo por la planto. Formiĝante en la folio, amelo transiras en la konsumantajn partojn de planto — en la semojn, trunkon kaj radikojn, kie ĝi kolektiĝas kiel rezerva nutra provizo. Ankaŭ tio estas eksperimente pruvebla: oni prenas somere folion de ajna planto kaj por minuto metas ĝin en bolantan akvon, kaj poste transportas en alkoholon kaj varmigas ĝin.

Post kelkaj minutoj la folio senkoloriĝos, ĉar la *klorofilo,* de kiu dependas la verda koloro de plantoj, solviĝos en alkoholo, kiu akceptos pro tio la belan verdan koloron. Metinte nun la senkoloran folion en solvaĵon de jodo, la folio fariĝos komence blua kaj poste nigra, ĉar jodo kolorigas amelon en bluan kaj, estante en granda kvanto, en nigran koloron.

Nun ni ĉirkaŭvolvu alian folion, ne forŝirante ĝin de la planto, per maldiafana papero, seniginte tiamaniere la folion je efiko de sunlumo. Sekvantan tagon, ripetinte kun tiu folio la eksperimenton kun alkoholo kaj jodo, ni konstatos ke ĉi folio ne entenas amelon — ĝi transiris en aliajn partojn de la planto, dum novaj kvantoj da amelo ne povis formiĝi en la folio pro foresto de sunlumo. Ni povas interese daŭrigi la eksperimenton, almetinte al la senameligita folio bonan foto-negativon kaj denove metinte la folion kun ĝi sub la efikon de sunlumo, Post kelkaj horoj ni per manipulado per solvaĵo de jodo ricevos sur la folio de foto-bildon (desegn. 2): la jodo nigrigis


la amelon, formiĝintan en tiuj lokoj de l' folio, kie alkuŝis la diafanaj partoj de l' foto negativo.

Ree pri energio.

La priskribitaj eksperimentoj atentigas pri du fenomenoj. Unue, la amelo povas formiĝi nur sub efiko de sunradioj, ĉar estas necese certe kvanto da energio (varmo) por malkomponi la karbonacidon je karbono kaj oksigeno Ĉar energio ne povas malaperi — ĝi kolektiĝas, transirinte en alian formon *), en la planto kaj tiamaniere planto akumulas sunenergion. Bruligante lignaĵon aŭ karbon (kiu formiĝas el la sama lignaĵo), ni denove transformas tiun ĉi energion en varmon, la lastan en movenergion de vapormaŝino ktp. Plej vaste ni utiligas en nia ĉiutaga vivo la sunenergion, akumulitan de plantoj.

Strukturo de folio.

Kaj due — la scienco pruvis ke la amelo formiĝas nur pro enhavo de klorofilo en folio. La klorofilo koncentriĝas en supra parto de folioj — sur la desegnaĵo (3) ĝi estas videbla en formo de nigraj longetaj grajnoj. Karbonacido, penetrinte en mezon de klorofila grajno malkomponiĝas tie je karbono kaj oksigeno kaj el la unua per certaj komplikaj procedoj formiĝas la amelo. Per tre interesaj eksperimentoj, priskribi kiujn mankas loko tie ĉi, scienculoj pruvis la gravan rolon de klorofilo en tiu ĉi procedo. Ni ripetu nur, ke la komenca produkto en tiu ĉi procedo estas formaldehido, formiĝanta el karbono kaj akvo; el formaldehido formiĝas sukeroj kaj el la lastaj amelo. Tiun sinsekvon ni notu en nia memoro por kompreni la graveeon de lastaj sukcesoj de kemio, kiujn ni aludis en komenco de l' konversacio kaj al kiuj ni nun revenas.



Desegnaĵo 3.

En 1910 jaro la fama Danielo Berthelot sukcesis ricevi formaldehidon, metinte sub efikon de ultraviolaj radioj **) miksaĵon el karbonacido kaj vaporoj de akvo. Tiamaniere li sukcesis reprodukti arte la saman procedon kiu okazas en verdaj folioj sub efiko de sunradioj kun partopreno de klorofilo. Tiu sukcesa rezulto de liaj sciencaj laboroj permesis al li skizi la fantazian (dume) bildon de fabriko, produktanta nutraĵon el ae. o.

---

*) Vidu artikoloj « Iom pri glavoj k. plugiloj » (« S. R. » 1925-26, pĝ. 35) kaj « Pri energio » (« S. R. », 1925-26, pĝ. 232).

**) Jam antaŭ 250 jaroj estis pruvita, ke suna lumo konsistas el sep koloroj fundamentaj: viola, indiga, blua, verda, flava, oranĝa kaj ruĝa. Estas vaste konata malkompono de suna lumo je tiuj fundamentaj koloroj per vitro-prismo. Ricevata per tiu procedo strio de sep koloroj estas nomata « spektro ». Postaj esploroj pruvis ke ekster tiuj koloroj radioj sunlumo havas ankaŭ radiojn efikantajn kemie kaj varm-efikajn radiojn. La unuaj estas nomitaj « ultra-violaj », ĉar ili troviĝas post la viola parto de spektro, la duaj, troviĝantaj post la ruĝa parto — infra-ruĝaj radioj. Legu pri tiu temo ankaŭ la artikolon pri « Spektra analizo » (« Sen. Rev. », novembro 1923, pĝ. 37).

Integra Instruado

M. BAKUNIN

1-VII-1926 estis la 50-a datreveno de la morto de l' granda revoluciulo-anarkisto Mikaelo Bakunin. Certe, al ĉiuj niaj legantoj la nomo de B. estas bone konata, multaj el ili certe legis liajn verkojn. Sed verŝajne tre malmultaj estas ti-kiuj scias pri la pedagogiaj ideoj de tiu-ĉi revolucia batalanto por la emancipo de l' proletaro.

B. ne estis edukisto-fakulo, sed la edukado-problemo profunde interesis lin. Krom pluraj fragmentaj notoj disĵetitaj sur la paĝoj de lia verkaro, ni havas en la literatura heredaĵo, kiun postlasis al ni B., kelkajn artikolojn, kie li ekspozis pli-malpli sisteme siajn pedagogiajn ideojn. Ni pensas, ke ĉi-ideoj ĝis nun ne perdis sian aktualan (ne nur historian) valoron por la tutmonda proletaro kaj tial estus utila, ke ĉiu revolucia proleto kaj ĉiu avangarda edukisto relegu tiujn paĝojn en la nuna jaro de la granda datreveno.

Ĉi-sube ni prezentas tradukon de 4 artikoloj de B. publikigitaj en 1869 en la franclingva gazeto « Egalité » (« Egaleco »), n-oj de la 31-VII, 7-VIII, 14-VIII kaj 21-VIII. (« Egalité » estis organo de la Romanda Federaĵo de l' Internacio en Ĝenevo). En la prezentata traduko kelkaj negravaj (por la ĝenerala koncepto de l' ped. ideoj de B.) fragmentoj estas forlasitaj kaj estas farita alia divido de la teksto je ĉapitroj.

La ĝenerala titolo « Integra instruado » (« L'Instruction intégrale «) apartenas al la aŭtoro ; la subtitoloj estas enmetitaj de la tradukinto por iomete plifaciligi la legadon, kiu estas sufiĉe malfacila pro la « peza » stilo de l' aŭtoro.

La Redakcio.

Instruado kaj edukado en klaseca socio.

Ĉu ne estas evidenta, ke el du homoj, kun denatura inteligento preskaŭ egala, tiu, kiu scios pli multe, kies spirito estos pli larĝiĝinta per la scienco kaj kiu, pli bone kompreninte la interligojn de l' naturaj kaj sociaj faktoj, aŭ de ti-kio estas nomata la leĝoj de l' naturo kaj de l' socio, komprenos pli facile kaj pli larĝe la karakteron de l' medio, en kiu li troviĝas, ol la aliu, ke li sentos sin tie pli libera, ke li estos pli lerta kaj pli multepova ol la aliu ? Ti-kiu scias pli multe regos nature tiun, kiu scios malpli ; kaj se komence ekzistus inter du klasoj nur ĉi-sola difero de instruado kaj de edukado, tiu-ĉi difero estus produktanta dum ioma tempo ĉiujn aliujn, kaj la mondo homa

---

La lastaj sciencaj laboroj, kies rezultoj estas publikitaj en la citita supre artikolo de « Journal of Chemical Society », atingis pliajn sukcesojn — formaldehido estas ricevita sub efiko jam ne de ultra-violaj radioj, sed de ordinaraj sunradioj. Kaj tio estas nova venko de homo super la naturo. Per ĝi estas farita nova paŝo por proksimigi nin al fabrikoj, ne imagataj sed realaj, por produktado de nutraĵo el aero.

estus reveninta al la nuntempa punkto, t. e. ĝi estus de nove dividita je maso da sklavoj kaj malgranda nombro de regantoj, kaj la unuaj estus samkiel nun laborantaj por la lastaj.

.... Oni povas nun diri pri la progresoj de l' scienco kaj de l' artoj tion, kio estis jam tiel prave dirita pri la mirinda disvolviĝo de l' industrio, de l' komerco, de la kredito, de l' socia riĉesto unuvorte, en la plej civilizitaj landoj de l' moderna mondo. Tiu-ĉi riĉaĵo estas tute ekskluziva kaj ĝi tendencas ĉiutage pligrandiĝi, kuncentriĝante en mannombro ĉiam pli malgranda kaj reĵetante la pli malsuprajn tavolojn de la meza klaso, la et-burĝaron, en la proletaron; tiel do la disvolviĝo de tiu riĉaĵo fariĝas senpera kaŭzo de l' kreskanta mizero de l' laboristaj masoj. El tio rezultas, ke la abismo, kiu dividas la feliĉan kaj privilegihavan minoriton de la milionoj da laboristoj, kiuj ĝin provizas per vivrimedoj per la laboro de siaj manoj, ĉiam pli kaj pli malfermiĝas, kaj ju pli feliĉaj estas la feliĉuloj, la ekspluatistoj de l' popola laboro, des pli malfeliĉaj estiĝas la laboruloj....

La samo estas en la progresoj de la scienco kaj de l' artoj. Ĉi-progresoj estas grandegaj! Jes, tio estas vera. Sed ju pli ili grandiĝas, des pli ili fariĝas kaŭzo de intelekta, kaj sekve ankaŭ materiala, sklaviĝo, kaŭzo de mizero kaj malsupreniĝo por la popolo; ĉar ili ĉiam pli kaj pli larĝigas la abismon, kiu dividas jam la popolan inteligenton de tiu de l' privilegihavaj klasoj. La unua, el la vidpunkto de l' natura kapablo, estas nun evidente malpli supersatigita, malpli uzita, malpli sofistiĝinta kaj malpli koruptita per la neceso defendi maljustajn interesojn, ĝi estas do nature pli potenca ol la inteligento burĝara; sed, kompense, ĉi-lasta havas por si ĉiujn armilojn de l' scienco, kaj tiu-ĉi armiloj estas teruraj. Ofte okazas, ke laboristo tre inteligenta estas devigita silenti antaŭ scianta malsaĝulo, kiu lin batas ne per la saĝo, kiun li ne havas, sed per la instruitesto, je kiu la laboristo estas senigita kaj kiun li, la scienculo, povis ricevi, ĉar, dum lia malsaĝo estis science disvolviĝanta en la lernejoj, la laboro de l' laboristo estis lin vestizanta, enloĝiganta, nutranta kaj provizanta per ĉiuj objektoj, instruistoj kaj libroj, kiuj estis necesaj por lia instruado....

Kiu povas nei, ke ĉiuj progresoj de l' scienco senescepte estis ĝis nun direktitaj nur al pligrandigo de l' riĉesto de la privilegihavaj klasoj kaj de la potenco de l' ŝtatoj, malprofite al la bonstato kaj la liberesto de l' popolaj masoj, de la proletaro?....

.... Ĝis nun la burĝoj estis marŝantaj pli rapide ol la proletoj sur la vojo de l' civilizo ne pro tio, ke ilia inteligento estis de nature pli potenca ol tiu de ĉi lastaj — hodiaŭ oni povus dire la malon, — sed pro tio, ke ĝis nun la ekonomia kaj politika organizo de l' socio estis tia, ke nur la burĝoj povis instrui sin, ke la scienco ekzistis nur por ili kaj ke la proletaro estis kondamnita al kontraŭvola nescio, tiel ke se ĝi estas tamen antaŭenirinta, — kaj ĝiaj progresoj estas eksterdubaj, — tio okazis ne dank' al la socio, sed ĝuste malgraŭ ĝi.

Ni resumu. En la nuna organizo de l' socio la progresoj de l' scienco estis la kaŭzo de l' *rilativa* nescio de l' proletaro, samkiel la progresoj de l' industrio kaj de la komerco estis la kaŭzo de ĝia mizero *rilativa*. Intelektaj kaj materialaj progresoj kontribuis do egale la pligrandiĝon de ĝia sklavesto. Kio do rezultas el tio? Ke ni devas reĵeti *tiun-ĉi* burĝan sciencon kaj batali

kontraŭ ĝi, samkiel ni devas tion fari al la riĉesto burĝa. Batali kontraŭ ili kaj reĵeti ilin tiusence, ke, detruante la socian ordon, kiu faris ilin hereda propraĵo de unu aŭ kelkaj klasoj, ni devas postuli ilin kiel komunan bonon por ĉiuj.

Sintezo de l' scienco kaj laboro.

Kiel membroj de l' Internacia Laborista Asocio, ni volas egaleston kaj, dezirante ĝin, ni devas voli ankaŭ integran instruadon egalan por ĉiuj.

Sed se ĉiuj estas instruitaj, kiu volos labori? — oni demandas. Nia respondo estas simpla: *Ĉiuj devas labori kaj ĉiuj devas esti instruitaj.* Al ĉi-tio oni tre ofte respondas, ke tia mikso de industria laboro kun laboro intelekta povos kaŭzi nur malprofiton al tiu kaj al la aliu: la manlaboristoj fariĝos malbonaj scienculoj kaj la scienculoj ĉiam restos nur la plej kompatindaj laboristoj. Jes, en la nuna socio, kie la manlaboro kaj la laboro de l' intelekto estas egale kripligataj per la tute artefarita izolitesto, al kiu ili estas kondamnitaj ĉiuj du. Sed ni estas konvinkitaj, ke en homo vivanta kaj tuteca ĉiu el ĉi-du aktivecoj — la muskola kaj la nerva — devas esti egale disvolvita kaj ke, tute ne malutilante unu la aliun, ĉiu el ili devas apogi, plilarĝigi kaj fortigi la aliun: la scienco de l' scienculo fariĝos pli fekunda, pli utila kaj pli larĝa, kiam la scienculo ne plu ignoros manlaboron, kaj la laboro de instruita laboristo estos pli inteligenta kaj sekve pli produktiva ol tiu de laboristo malklera.

El tio sekvas, ke en la intereso mem de l' laboro samkiel en tiu de l' scienco necesas, ke ne estu plu laboristoj, nek sciencistoj, sed nur homoj.

Rezulte estos tio, ke la homoj, kiuj estas hodiaŭ, pro sia pli supera intelekto, entiritaj en la ekskluzivan mondon de l' scienco kaj kiuj, fiksiginte en tiu mondo kaj cedante al la neceso de sia pozicio tute burĝeca, turnigas ĉiujn siajn inventojn al la ekskluziva utilo por la privilegihava klaso, kies parto ili mem estas, — ke tiuj-ĉi homoj, post kiam ili estiĝos reale solidaraj kun ĉiuj, solidaraj ne nur image, nek parole, sed fakte, per la laboro, samtiel necese turnigos la malkovrojn kaj la aplikojn de l' scienco al ĉies utilo, kaj antaŭ ĉio al la plifaciligo kaj plialtigo de l' laboro, tiu sole legitima kaj sole reala bazo de l' homara socio.

Estas ebla kaj eĉ verŝajna, ke en la pli aŭ malpli longa transirepoko, kiu postsekvos nature la grandan socian krizon, la plej altaj sciencoj multege falos sub ilian nunan nivelon; samkiel estas nedubinda antaŭ tio, ke la lukso kaj ĉio konsistiganta la rafinitaĵojn de la vivo, devos malaperi el la socio por longa tempo kaj povos reaperi ne plu kiel ĝuaĵo ekskluziva, sed kiel plinobligaĵo de l' vivo por ĉiuj, nur postkiam la socio estos konkirinta ĉion necesan por ĉiuj. Sed ĉu estos tiu kelktempa eklipso de l' supera scienco tia granda malfeliĉo? Ĉu ne gajnos la scienco per la plilarĝigo de sia bazo tion, kion ĝi perdos en sia altega suprenleviĝo? Sendube, estos malpli da gloraj scienculoj, sed samtempe estos malpli da malkleruloj. Ne plu estos ĉi-kelkaj homoj tuŝantaj la ĉielon, sed kompense milionoj da homoj, kiuj nun estus humiligitaj, dispremitaj, vivos homece sur la tero; nek duon-dioj, nek sklavoj. La duon-dioj kaj la sklavoj homiĝos samtempe, la unuaj iom malsupreniĝinte, la aliuj multe supreniĝinte. Ne estos do plu loko por diigo, nek por malŝato. Ĉiuj donos unu al la aliu la manojn kaj unufoje kuniĝinte, ĉiuj marŝos kun nova vervo al novaj konkiroj samtiel en la scienco, kiel en la vivo.

Tial do, neniom timante ĉi-tiun eklipson, cetere tute nedaŭran, de la scienco, ni — male — plenvoĉe vokas ĝin, ĉar ĝia efiko estos: samtempa kuniĝo de l' sciencistoj kaj de la manlaboristoj, repacigo de l' scienco kaj la vivo. Kaj ni estas konvinkitaj, ke postkiam ĉi-tiu nova bazo estos konkirita, la progresoj de l' homaro, tiel en la scienco kiel en la vivo, tre baldaŭ superos ĉion, kion ni estis vidintaj, kaj ĉion, kion ni povas imagi hodiaŭ.

Individuaj kapabloj kaj egala edukado.

Ĉu estas egale kapablaj ĉiuj individuoj supreniĝi al la sama ŝtupo de instruistesto? Ni imagu al ni socion organizitan plej egalece, socion, en kiu ĉiuj infanoj havos de sia naskiĝo la saman deiro-punkton samtiel en la rilato ekonomia kaj socia, samkiel en la rilato politika, tio estas absolute la saman prizorgon, la saman edukadon, la saman instruadon; ĉu ne estos inter ĉi-tiuj miloj da malgrandaj individuoj senfinaj diferoj de energio, de natur-tendencoj, de kapabloj?

Jen la granda argumento de niaj kontraŭloj pure-burĝaj kaj burĝe-socialistaj. Ili kredas, ke ĝi estas nerezistebla. Estu do nia tasko pruvi al ili la malon. Unue, kiarajte ili fondas sin sur la principo de individuaj kapabloj? Ĉu estas loko por la disvolviĝo de tiuj-ĉi kapabloj en la nuna socio? Ĉu povas esti loko por ilia disvolviĝo en socio, kiu daŭros havi kiel bazon la heredo-rajton? Evidente ne, ĉar de la momento, kiam oni havos heredaĵon, la kariero de l' infanoj neniam plu estos rezulto de iliaj kapabloj kaj de ilia individua energio: ĝi estos antaŭ ĉio tiu de la havo-stato, de la riĉesto aŭ de l' mizero de iliaj familioj. La heredintoj riĉaj, sed malsaĝaj, ricevos superan instruadon; la plej inteligentaj infanoj de l' proletaro daŭros ricevadi herede la malklereston, tute samkiel tio estas nun praktikata. Ĉu ne estas do hipokriteco paroli ne nur en la nuna socio, sed eĉ rilate al socio reformita, kiu daŭrus tamen havi kiel bazojn la individuan propraĵ-rajton kaj la heredo-rajton, ĉu ne estas malnobla trompo paroli ĉi-kaze pri individuaj rajtoj fonditaj sur individuaj kapabloj?

.... La individua libero, ne privilegiula, sed tuthomara, la realaj kapabloj de l'individuoj povos ricevi sian plenan disvolviĝon nun en plena egalesto. Kiam ekzistos *egalesto de la deira punkto* por ĉiuj homoj sur la tero, nur tiam — se estos tamen gardataj la superaj rajtoj de l' solidareco, kiu estis kaj restos ĉiam la plej granda produktanto de ĉiuj sociaj aĵoj: homa inteligento kaj materialaj bonoj — tiam oni povos diri, kun multe pli da pravo ol hodiaŭ, ke ĉiu individuo estas filo de siaj verkoj. El tio-ĉi ni konkludas, ke, por ke la individuaj kapabloj prosperu kaj ne estu plu malhelpataj en la portado de siaj fruktoj, necesas antaŭ ĉio, ke ĉiuj individuaj privilegioj, tiel la ekonomiaj kiel la politikaj, estu malaperintaj, tio-estas ke ĉiuj klasoj estu nuligitaj. Necesas la malapero de l' individua propraĵo kaj de l' heredo-rajto, necesas la ekonomia, politika kaj socia venko de l' egalo.

Sed postkiam la egalo estos triumfinta kaj tute firmiĝinta, ĉu estos plu nula difero inter la kapabloj kaj energi-gradoj de diversaj individuoj? Ĝi ekzistos, eble ne tiom, kiom ĝi ekzistas hodiaŭ, sed ĝi ĉiam ekzistos sendube. Ĝi estas vero pasinta en proverbon, kaj kiu verŝajne neniam ĉesos esti vero, ke ne ekzistas eĉ sur la sama arbo du folioj, kiuj estus tute identaj. Multe pli prava estos tiu vero ĉiam rilate al homoj, kiuj estas ja estaĵoj multe pli

malsimplaj ol folioj. Sed tiu-ĉi diversesto, malproksima de tio ke ĝi estu malbona, tute kontraŭe, kiel tre bone rimarkis la germana filozofo Feuerbach, estas riĉaĵo de l' homaro. Dank'al ĝi la homaro estas tuteca kolektivo, en kiu ĉiu kompletigas ĉiujn kaj bezonas ĉiujn; tiel do ĉi-tiu senfina diversesto de homaj individuoj estas la kaŭzo mem, la ĉefa bazo de ilia solidaresto, ĉiopova argumento por la egalo.

Esence, eĉ en la nuna socio, se oni esceptas du hom-kategoriojn, la geniulojn kaj la idiotojn, kaj se oni faras abstraktigon de diferoj kreitaj artefarite per la influo de mil sociaj kaŭzoj, kiel ekz. edukado, instruado, ekonomia kaj politika situo, kiuj diferas ne sole en ĉiu socia grupo, sed preskaŭ en ĉiu familio, oni rekonos ke, el la vidpunkto de intelektaj kapabloj kaj morala energio, la grandega plimulto da homoj multe intersimilas aŭ almenaŭ intervaloras, ĉar la malfortesto de ĉiu unurilate estas preskaŭ ĉiam kompensata de egalvalora fortesto alirilate, tiel ke fariĝas neebla diri, ke iu homo prenita en tiu maso estas multe superanta aŭ malsuperanta aliun. La grandega plimulto da homoj ne estas identa, sed egalvalora kaj sekve egala. Restas do por la argumentado de niaj kontraŭuloj nur la geniuloj kaj la idiotoj.

La idiotismo estas, tion oni scias, malsano fiziologia kaj socia. Ĝi estas do traktenda ne en la lernejoj, sed en la hospitaloj, kaj oni rajtas esperi, ke la enkonduko de pli racia socia higieno, precipe pli zorgema rilate al la fizika kaj morala sano de l' individuoj, ol tiu nuntempa, kaj la egaleca organizo de la nova socia tute malaperigos de la tera surfaco ĉi-malsanon tiom humiligan por la homa speco. Koncerne la geniulojn necesas komence rimarki, ke feliĉe aŭ malfeliĉe, kiel oni volas, ili estis ĉiam aperantaj en la historio nur kiel tre raraj esceptoj el ĉiuj konataj reguloj. kaj esceptojn oni ne organizas. Ni tamen esperu, ke la venonta socio trovos en sia reale praktika kaj popoleca organizo de sia kolektiva forto rimedon por fari ĉi-grandajn geniojn malpli necesaj, malpli premegantaj kaj pli reale bonfarantaj por ĉiuj. Ĉar neniam oni devas forgesi la profundan diron de Voltaire: « Ekzistas iu, kiu havas pli da saĝo ol la plej grandaj geniuloj, — tio estas ĉiuj ». Temas do nur pri la organizo de ĉiuj-ĉi per la plej granda libero fondita sur la plej plena egalesto ekonomia, politika kaj socia, por ke oni ne havu plu pro kio timi diktatoremajn dezirojn kaj despotecan ambicion de geniuloj.

Pri produktado de geniuloj per edukado ne necesas eĉ pensi.... Neniam en la infanaĝo, nek eĉ en la adoleskaĝo oni povas determini la rilativajn superecojn aŭ malsuperecojn de homoj, nek la gradon de iliaj kapabloj, nek iliajn denaturajn inklinojn. Ĉio-ĉi manifestiĝas kaj determiniĝas nur per la disvolviĝo de l' individuoj, kaj ĉar ekzistas iuj naturoj fruematuriĝantaj kaj aliuj tre malrapide, kvankam ili tute ne estas pli malsuperaj kaj ofte eĉ pli superaj, — neniu instruisto povos iam tro frue precizigi la karieron kaj la specon de okupoj, kiujn la infanoj elektos, kiam ili estas atingintaj la aĝon de liberesto.

El tio rezultas, ke la socio, absolute ne konsiderante la realan aŭ fikcian diferon de inklinoj kaj kapabloj kaj havante neniun rimedon por determini, nek iun rajton por fiksi, la futuran karieron de l' infanoj, devas al ĉiuj senescepte doni *edukadon kaj instruadon absolute egalan.*

Trad. el la franca.

Komparo de Edukado en U.S.S.R. kaj Britio

Mark STARR

Vizitinte la VI-an SAT-Kongreson en Leningrado, mi poste intervjuis diversajn instruistojn kaj ekzamenis lernejojn. Tie ĉi mi ne povas doni multe da statistiko aŭ precizan esploran enketon, sed nur la ĝeneralajn impresojn ricevitajn. La kontrastoj certe estas trafaj kaj pripensindaj.

Eĉ en miaj plej fruaj horoj en Leningrad mi konstatis ke la ĉefkomisaro de popolklerigo, K-do Lunaĉarski, ne estis reakcia aristokrato kiel la brita ĉefministro edukada Lord Eustace Percy. Kontraŭe, li ne estas rutinulo, sed progresemulo, kiu priscias la faktojn de la vivo. Tial li verkis la jenan leteron :

Al la VI-a Internacia Kongreso
de Laborista Esperantistaro Unuecfronta.

Mi devas konfesi, ke mi mem ne parolas esperanton kaj ne sufiĉe konas la bazojn de tiu ĉi lingvo. En mi ankoraŭ vivas kelkaj aprioriaj konsideroj pri tio ke dubinde per vojo de artefarita lingvo oni povas krei tiun unuecan lingvon de l'internacia komunikado, kiun celas esperanto. Tamen la faktoj estas obstina afero, kaj la faktoj parolas por esperanto. Tiu ĉi movado vastiĝas kun nerefutebla potenco kaj transformiĝas je unu el la plej seriozaj fenomenoj de la moderna socia vivo. Oni ne povas ankaŭ nei, ke la adeptoj de esperanto, konsciante sin konduktoroj de la ekstreme progresivaj formoj de la homa interkomunikado, sentas certan proksimecon al la granda komunista movado kaj ke inter la komunistoj iufoje tutaj organizaĵoj aliĝas al la movado esperantista.

Mi tutanime deziras al esperanto pluan pliproksimiĝon kun la avangardaj formoj de la batalo laborista kaj pluajn sukcesojn.

A. Lunaĉarski.

29 Julio 1926.

Nenion similan leteron povus aŭ volus verki Lord Eustace Percy, kiu parolas mistike pri idealisma edukado kiu teorie estas super la barakto klasa. Mi povas jam antaŭvidi, ke Sovetio pioniros la enkondukon de Esperanto en la lernejo kaj tiel gajnos pluajn sukcesojn por la laboristaro tutmonda en la necesa unuiĝo.

Jen alia okulfrapa kontrasto. En Britio, spite de la teorio supre menciita, la lernejo estas dresejo por la viktimoj de kapitalismo. En ĝi la estonta salajrsklavo lernas skribi, legi, kalkuli kaj tiel plu por fariĝi taŭga kaj efika servanto por sia mastro. Tia lernado ja necesas por moderna industrio. Sed en Sovetio la lernejo estas kreskejo por novaj idealoj. Ĝi preparas la geknabojn funkcii en la nova komunumo. Ĝi antaŭenpuŝas la klaskonsciencon.

La britaj lernolibroj traktas pri antikvaj estintaj aferoj — la bataloj de Imperioj, la agoj de gereĝoj, la ruzoj de diplomatoj k. t. p. Ili kulturas la mortigan naciismon kaj la danĝeran ŝovinismon. Tute kontraŭa estas la spirito de la soveta lernejo kaj eĉ la ruĝa armeano ĵuras esti lojala, ne al iu lando aŭ imperio, sed servi la laboristaron tutmondan.

Alia punkto de komparo estas la aljuĝo de lokoj en la pli altaj lernejoj kaj universitatoj. En Britio nur post sukcesa plenumo de tre severaj ekzamenoj la filo de laboristo povas malofte atingi tiajn instituciojn. Ofte eĉ kiam li sukcesis en la ekzameno, la filo de laboristo ne povas ĉeesti superan lernejon ĉar mankas al la gepatroj la mono necesa subteni lin en

tiaj institucioj. Sed filo de riĉulo povas iri senhalte al famaj lernejoj (ekz. Harrow, Eton, Cambridge, Oxford) pro la plena monujo de sia patro. Tamen en Sovetio la filo de laboristo kaj la laboristo mem rajte ricevas preferon. Jen granda diferenco en la lando, en kiu la laboristaro regas.

Anstataŭ « Angulo de Lenin » estas en la britaj lernejoj multaj bildoj pri gereĝoj kaj batalscenoj. La britaj infanoj kantas solene « La reĝon savu Di' » anstataŭ « La Internacio'n » kun ĝia alta alvoko por finlukto socia al la homaro. Soleno por la brita lernanto estas « Imperia Tago », kiam ofte reakciulo vizitas la lernejon por priparoladi fanfarone pri la forto, progreso kaj boneco de Imperio, kiu fakte superregis 400 milionojn da homoj sub sia fera kalkanumo.

La brita instruisto ofte estas diktatoro kaj en granda klaso li kondutas kiel kazern-serĝento. Mankas tute la memrego kaj la memdisciplino de la studentoj per ilia komitato. Kvankam estas klinikoj kie britaj patrinoj povas havi konsilon pri la sano de sia infano kaj ekzamenoj per kuracistoj de la pli aĝaj infanoj, ne estas granda bataliro kontraŭ nescio. Ne tiom uzataj kiom en Sovetio estas la plakatoj de priinfanzorgado.

En Britio certe la instruisto ricevas pli altan salajron, de 160 ĝis 800 rubloj pomonate kaj ĝenerale havas pli altan vivnivelon. Pro tio kaj la influo de burĝa universitato kaj superlernejo, en kiu li edukiĝis, la brita instruisto ofte estas tro konservativema. Neniam li ĝenerale, kiel en Sovetio, aniĝas al revolucia movado. Sed nun komencas limigo de elspezo por edukado en Britio kaj certe la registaro de Baldwin penos plue malaltigi la salajron kaj plilarĝigi la klason. Tute kontraŭa estas la celo de la registaro en U. S. S. R. Nur la bojkoto kaj atako kontraŭ tiu lando malhelpis, ke oni tuj plibonigis la eduksistemon.

Kvankam la brita instruisto havas pli altan salajron, li ne posedas la rajton politike helpi la laboristaron. Ekzemple dum la Ĝenerala Striko, K-dino M. D. Clarke (ĉe Bournville) kaj S-ino M. Pollit (ĉe Londono) estis maldungitaj ĉar ili rompis leĝon speciale verkitan por helpi la strikrompantojn. Pro teroro la brita instruisto devas ne intermiksi politikon kun la lernejo. Nun en Britio la progresemaj instruistoj fondis specialan Ligon (Teachers Labour League) kiu batalas kontraŭ persekutado de socialistaj kaj komunistaj instruistoj kaj propagandas inter iliaj kolegoj. Tiu ĉi Ligo senkaŝe aniĝis al la Laborista Partio kaj la Edukista Internacio kiu kunelaboras kun la soveta instruistsindikato.

Kompreneble bona lernejo ne estas ebla en la malbona kapitalista sistemo.

En Britio analfabeteco ne ekzistas ĉar de la jaro 1880 ĉiu infano devas ĉeesti lernejon. Nun ĉiu infano de 5-a jaro ĝis la 14-a jaro devige instruiĝas. Britio estas la riĉa hejmlando de kapitalismo kaj ne heredis la malbenon de carismo. Pro tio ĝi havas multe de lernejoj. Sed en tiuj lernejoj plejparte oni instruas laŭ rutino kaj produktas obeantojn ne pensantojn. Nur en aparta lernejo por filoj de riĉuloj oni eksperimentas en novaj instrumetodoj, En Sovetio ne ekzistas konflikto inter industrio kaj la lernejo ĉar la Ŝtato gvidas ambaŭ. En Britio estas la suspekto, ke la kapitalistoj volas havi pli grandan kaj pli malkaran provizon de teknikistoj kiam ili proponas la fabrikejo-lernejon.

Per tiu ĉi komparo mi mem konvinkiĝas ke la estonteco apartenas al la edukado de U. S. S. R.

Mark STARR.



 SOCIPROBLEMOJ 

La Unuformeco de l' Mondkulturo (1)

K. KAŬTSKY

Kiom tio ŝajnas stranga, sed ekzistas socialistoj, kiuj pasie batalas kontraŭ la asimilizo de l' nacianaroj kaj de ties kulturoj. Ili opinias, ke kun la malapero de l' diferenco inter nacioj kaj lingvoj, la mondo estus destinita al unuformeco kaj spirita malriĉiĝo. Ĉi-tio, certe, laŭ si mem, pruvas nenion. La fabrikaj varoj estas multsignife pli unuformecaj ol la manufakturaj aŭ hejm-metiejaj, sed estus reakcie malhelpi ilian disvastigadon.

Antaŭ ĉio, tamen, ĉi-tie temas ne pri kio plaĉas al ni. Ne temas pri tio, ĉu plaĉas al ni aŭ ne — la ekaperanta — pro evoluo de l' internacia cirkulado — asimiliva procedo de popoloj, sed la demando estas en tio, ĉu ni lasu tiun procedon disvolviĝi aŭ ni perforte kontraŭagu ĝin. Kiel demokratoj ni en ĉi-kazo devas rezigni je ĉia perforto super la popolmasoj, devas esti kontraŭ ĉia perforta interveno en la regionon de l'interesoj pri iliaj lingvo kaj religio. Kiel rilate al lingvo, same rilate al religio nek unu civitano en la ŝtato povas esti metita en pli malfavoran situacion, ol aliaj. Sed samkiel la ŝtato ne defendas la religion kontraŭ la libervola foriro de l' kredantoj, tiel ĝi ne povas defendi la lingvon aŭ nacion kontraŭ la libervola elfalo de ties anoj.

Ni socialistoj, la defendantoj de l' proletaro, samenergie protestas kontraŭ politika kaj ekonomia persekutado de iu aŭ alia lingvo, kiel kontraŭ la favorigo aŭ persekuto de iu aŭ alia religio. Nin tute ne haltigas tiu fakto ke pro nia neŭtreco eble iu aŭ alia lingvo aŭ iu aŭ alia religio eliĝos el uzado, eĉ se ni bedaŭrus pri tiu cirkonstanco.

Sed ne estas bezono tiom bedaŭri la malaperon de l' multlingveco.

Entute, certe, la kresko de l' unuformeco kaj niveligo, kiun alportas kun si la disvolvo de kapitalismo, estas sufiĉe neĝojiga. Tute malprave David (2) en la citita jam de ni loko el lia libro « Social-demokratio kaj la mondmilito » tial konsideras neceseco la kreskon de l' diferencigo de nacioj, ke « ĉiu evoluo estas pli difinita diferenciĝo » kaj ke ni « elvidas ĉi-tie la influon de grava biologia leĝo ». Antaŭ ĉio ni studas ĉi-tie la socion, ne animal-organismojn. En ĉi-kazo la biologio havas nenian rilaton al ni. Kiu venis al siaj ekonomiaj opinioj sur la bazo de studado pri la disvolvo de kapitalista produktadmaniero, tiu klare vidas, ke la kreskon de l' riĉeco de *produktoj*, kiun alport-

---

(1) IX-a ĉap. el verko : « Liberigo de Nacioj » (g).
(2) Fama germania social-demokrato.

as kun si kapitalismo sekvas kresko de l' unutoneco, malriĉiĝo de *formoj.* Kaj tiu ligiteco ne estas hazarda.

Granda labor-produktivo ĉe la moderna produktad-maniero estas la rezulto de l' pomasa produktigo, ĉiam unuformeca. La produktaĵoj kaj la produktiloj fariĝas pli kaj pli unuformaj. Inter la produktiloj unuan lokon okupas la naturo mem.

La evoluo de l' kulturo, de l' regado homa super la naturo signas mizeriĝon de l' natur-formoj, signas la substituon de l' diverseco de kreskaĵoj el praarbaroj per la unuformeco de l' plugita kampo, signas la substituon de l' senfina diverseco de sovaĝbestoj per nemultaj specoj de hejm-bestoj. Ĝis la apero de l' homo la naturo disvolviĝas en luksa multformeco. De l' momento de hom-apero ekhaltiĝas la progreso de l' naturo organika.

« De l' mezo de pliocena (1) epoko ni ne povas mencii iom ajn kredeblan aperon de nova speco. La diluvan kaj pluajn periodojn distingigas kune kun la apero de speco Homo Sapiens nur degenero kaj malriĉiĝo » (W. Kobelti (g), « La Malplilarĝiĝo de l' Animalmondo », 1902, Antaŭparolo).

Kapitalismo treege disvolvis la ilojn kaj celadon al tiu malriĉiĝo, kiu alprenas laŭvere terurigajn dimensiojn. La cirkonstancaro efikas al homo; la mizeriĝo de formoj devas konduki al spirita malriĉiĝo je la sama mezuro, kiel la malpliigo de diversformeco de l' ĉirkaŭanta medio sekvigas la malpliigon de aplik-formoj de l' homaj menskapabloj.

Sed ekzistas faktoroj kontraŭefikantaj tion. La sama tekniko, kiu detruas la formojn de l' naturo, kondukas al esplorado de tiuj formoj, kiuj estis neatingeblaj por la menso de l' prahomo. Ĝi disvolvas la teron kaj nudigas la riĉecon de l' praepoko; la teleskopo malkovras senlimajn malproksimojn, la mikroskopo — senfine malgrandajn mondojn.

La sama tekniko pli kaj pli liberigas la homon el la luktado por ekzisto, plimultigas lian libertempon kaj donas al li komforton, kiu estas nenio alia, ol multformeco, artifike konservita aŭ artifike kreita.

La komforto estas ekonomia neeviteblaĵo. Ju pli alta estas la produktivo de l' laboristo, des pli kreiĝas da komforteblecoj. Ju plia estas do, unuflanke, la kreita — per ekonomiko — unuformeco de l' vivo, des plie eblas kontraŭagi ĝin per lukso. La komforto estas la malo de ekonomio kaj ĉisence egalas malŝparecon. Sed malŝpareco ne devas esti devige sensenca — ĝi fariĝas tia en sensencaj manoj.

Se lasi senkonstruaĵa pitoreskan regionon, gardi la sovaĝbestojn kontraŭ formortigo, kvankam ili estas certe senutilaj, konservi kaj renovigi ruinojn anstataŭ ilin uzi kiel konstrumaterialo, jen estas lukso, precize samkiel ĉia arto estas lukso. Tio kontraŭstaras la mizeriĝon de l' vivo, naskitan de l' ekonomio.

Iu aŭ alia formo de vivmalsameco, kiun kreas *lukso,* estis de tiu tempo dum ekzistas klasaj diferencoj, la privilegio de l' posedantaj klasoj, samkiel la diversformeco, rezultanta el scienco. La laborulaj klasoj konis alian flankon de l' ekonomia evoluo: la kreskantan malpleniĝon kaj unutonecon de l' vivenhavo, kiu en la kapitalista socio atingas sian apogeon.

---

(1) Plej freŝtempa formaci-periodo de l' tria epoko (geologia).

La socialismo estas kontraŭefikaĵo kontraŭ la malriĉigo de l' vivo. Ĝi faras el scienco, arto, ĝuado de l' naturo la komunan posedaĵon de l' popolmasoj. Nur tiavoje ni povas kontraŭagi la unuformecon de l' vivo, sekvantan el ekonomia evoluo.

Gravan rolon ludas demando pri loĝantaro. Pasintan centjaron regis timego pri tropopoliĝo. Oni konsideris la mizeron rezulto de tropopoliĝo. Tio estis tute senbaza. La dudeka centjaro komencas kun timego pri malpliiĝo de l' loĝantaro. Tiu timego trafis eĉ al socialistoj, kiujn maltrankviligas la falo de l' naskaro. Sed la rapida plimultiĝo de l' loĝantaro estas dezirinda nur el vidpunkto de potenca nacia politiko, kiu celas plimultiĝon de l' propra popolo por ricevi laŭeble pli grandan influon sur la pesiltelero de l' mondpolitiko. Por la bonstato de l' masoj ne ekzistas neceseco pri rapida plimultiĝo. Se dum jarcento la plimultiĝo marŝus samrapide kiel nun, kreiĝus teruriga situacio. La loĝantaro de Eŭropo dum 14-a jarcento proksimis al 100 milionoj, eĉ komence de l' 18-a centj. ĝi kvante preskaŭ ne aliiĝis. Poste, ĝis 1.800 ĝi pligrandiĝis ĝis 175 milionoj kaj al komenco de l' mondmilito jam elkreskis ĝis 460 milionoj. Kun tia kresk-rapideco post jarcento la loĝantaro de Eŭropo pligrandiĝos ĝis 1.200 milionoj. Ne decas, kompreneble, sin nutri per malthusana timo pri la kvazaŭneebleco satigi tiujn masojn. Sed komforton, riĉecon de l' naturaj trezoroj ili certe perdos. Ju pli kreskas la nombro da uloj nutrigendaj, des pli necese estas uzi ĉiun terparcelon taŭgan por kulturigo.

La malpligrandiĝo de l' nombro de naskoj, kiu, interalie, ne devas nin timigi, montras klare ke la afero ne alvenos al tia grado.

Tio kompreneble ne signifas ke la malpliigo de l' nombro de naskoj en la proletaj medioj povas esti rimedo por la emancipo de l' proletaro. Tia rimedo estas absolute maltaŭga.

La socialista socio, samkiel la kapitalista, estas bazita sur pomasa produktado. Tia karaktero de l' produktado altigas la laborproduktivon, kiu donas la eblecon ne nur garantii por ĉiu ano de l' socio la necesajn vivrimedojn, sed ankoraŭ fari atingeblaj por ili ĉiujn kulturtrezorojn, ĝis minimumo malpliigi la necesan labortempon kaj ĝis maksimumo pliigi la efektivan riĉaĵon de ĉiu : la libertempon.

La pomasa produktado naskas pomasan konsumadon, ĝi supozas pri grandaj popolmasoj, kiuj laboras ĉe la produktado.

La unika kreig-vojo de tiuj masoj estas la vojo de l' rapida plimultiĝo. En la kondiĉoj de socialismo ne necesas atendi tian kreskon de l' loĝantaro, male, ĝi kontraŭstarus al la bezono de l' masoj je lukso. Sed feliĉe, la pliarĝigo de l' pomasa produktado ne estas la unika vojo al pligrandigo de l' labor-produktivo. Alia vojo al tiu celo estas la plifortigo de l' inter-nacia cirkulado. Dank' al tiu iliaj necesaj bezonoj fariĝos pli unuformaj kaj eblos esti satigitaj el nemultaj industricentroj, al kiuj el la tuta mondo estas liveritaj krudaĵoj.

La pleja intensivo de l' internacia cirkulado fariĝos la viv-kondiĉo de l' socialisto socio. La natura rezulto el tio estas la ĉiurimeda forigo de l' bariloj kontraŭ tiu cirkulado, kaj de la plej grava el ili : diverslingveco.

Sendube la socialista socio kapablos kontraŭagi la kreskon de l' unuformeco, kiun portas kun si la kapitalista ekonomio. Sed ĝi ne povas ĝin

kontraŭagi en la regiono de ekonomio. Ĝi devos daŭrigi la pomasan produktadon kun ĉiuj rezultoj, kiujn tiu sekvigas ekz. la asimiladon de l' nacioj, se ĝi ne deziros subhaki la trunkon, sur kiu ĝi sidos t. e. la alte disvolvigitan laborproduktivon. Nur per disvastigo de l' lukso kaj antaŭ ĉio de trezoroj de l' naturo, la fonto de beleco, riĉeco kaj ĝuo, eblas kontraŭagi la unuformecon de ekonomio, sed ne per konservado de l' diverslingveco.

Jam en Biblio la diverslingveco estus konsiderita kiel grandega malprofito por la homaro. La Biblio konstatis la devenon de l' homaro el unu paro kaj konsideris ke komence ekzistis nur unu lingvo, kaj apenaŭ la homoj plimultiĝas kvante, evoluas spirite kaj komencas konstrui turon, kiu devos altiĝi ĝis la ĉielo mem, dio estas ektimigata. Ĝi opinias, ke ĝi ne povos sin defendi, se ĉiuj komprenos unu la alian :

« Kaj Jehovo diris : Ĉiuj ili estas idoj de unu popolo kaj lingvo ilia estas komuna ; ĉi-tio estas la komenco de iliaj agoj kaj denun nenio estos malebla, kion ajn ili entreprenu, kaj tial ni malsupreniru al ili kaj miksu ni iliajn lingvojn por ke unu ĉesu kompreni la lingvon de aliu (1 Libro de Moseo, 11, 6, 7). Tiel Jehovo estis malhelpinta la supreniron de l' homaro. Ĉi tie estas kantata la kanto el kantoj internaciisma.

La lingvodivido malplifortigis la potencon de l' homaro. La lingv-unuiĝo signifas altigon ĝian ĝis la potenc-apogeo. Kontraŭagi tion estus reakcie. Pro diversformeco malhelpi la popolojn alpaŝi en interkomprenon signifus netaŭgajn kaj malutilajn rimedojn kontraŭ utila afero (1).

Esp-igis V. K.



(1) Pro la konkludoj, simpatiigaj al mondlingvo, kiujn elvokas ĉe la leganto ĉi-fragmento el la verko de Kaŭtsky, ĝi estas represinda en naciaj lingvoj (en revuoj k. gazetoj) kiel *argumentilo poresperanta.*

radoj (certe ne rilate la enkarceriĝon, sed rilate la modelan laboremon).

Se vigle venos kunlaboraĵoj al la redakta tablo — pli facila estos la tasko de l' redaktantoj : ili bezonos nur elekti el la veninta materialo tion, kio pleje taŭgas por krei unuecon de l' kajero, kio pleje konformas al aparta numero pro interna kontinueco laŭenhava de apartaj verketoj. Kaj tiam plifaciliĝus ankaŭ la regula aperado de l' revuo, lastatempe aperanta kun ĉiamaj malfruiĝoj ĝuste pro tio, ke la redaktantoj, cetere sufiĉe ŝarĝitaj per movadaj taskoj, estas devigataj instigi kunlaborantojn, kolektante materialon por diversaj fakoj de l' revuo, atendante ĝian alvenon.

Kaj samtempe pli interesa estos la revuo, ĉar daŭre ĝi konservos sian diversfakecon. Tio helpos varbi novajn abonantojn (malaltigo de l' abonprezo tion ebligas plej bone en nuna momento) — kaj paralele al la kresko de abonantaro — pliampleksigi la revuon.

Ni do metu antaŭ ni tiujn taskojn por la nova jaro :

Vigla kunlaborado al ĉiuj fakoj de l' revuo !

Vigla varbado de abonantoj surbaze de malaltigita abonprezo !

La diversfakeco de l' hodiaŭa kajero helpu al sukcesa plenumo de ambaŭ taskoj.

La Redakcio.

Se tiu ĉi kajero de l' revuo plaĉis al vi...
varbu novajn abonantojn !

SAT

helpas al tio
malaltigante la abonprezon.

Se la kajero ne plaĉis al vi...
skribu al la redakcio

kio kaj kial

ne plaĉis kaj kiamaniere vi konsilas plibonigi.

SENNACIECA REVUO

LITERATURO - SCIENCO - PEDAGOGIO

MONATA ORGANO  FONDITA EN 1919

Monata revuo ilustrita, belaspekta, bonstila. Enhavas plej bonajn fragmentojn de moderna prolet-mondliteraturo; scienc-teknikajn artikolojn pri stato kaj progreso de sciencoj; skizojn pri spertoj kaj metodoj de prolet-edukado kaj pedagogio, ktp.

Redaktejo: 1-a Tverskaja-Jamskaja 35 kv. 5, MOSKVO (USSR)
Administrejo: Colmstrasse 1, LEIPZIG - O - 27 (Germanio)



Nova tarifo de jarabono al "Sennacieca Revuo"

valida de oktobro 1926

(La unuaj nombroj, kiuj ĵus sekvas la landnomon montras la abonprezon por membroj de SAT, — la nombroj inter krampoj la abonprezon por nemembroj.)

Argentino **2** pes. (**2,50**); Aŭstrio **4** ŝil. (**5**); Belgio **13** fr. b. (**15**); Brazilio **4** milr. (**5**); Britio **3** ŝil. (**4**); Bulgario **80** lev. (**100**); Cekoslovakio **20** kr. (**25**); Danio **2,50** kr. (**3**); Estonio **250** mk. (**300**); Finnlando **25** mk. (**30**); Francio **13** fr. fr. (**15**); Germanio **2,50** mk. (**3**); Hispanio **4** pes. (**5**); Hungario **40.000** kr. (**50.000**); Italio **15** lir. (**20**); Japanio **1,50** jen (**2**) Jugoslavio **40** din. (**45**); Latvio **3** lat. (**3,50**); Litovio **6** lid. (**7**); Nederlando **1,50** guld. (**2**); Norvegio **3** kr. (**4**); Polio **3** zl. (**4**); Portugalio **12** esk. (**15**); Rumanio **120** lej (**150**); Sovet-Unio **1,25** rub. (**1,50**); Svedio **2,50** kr. (**3**); Svisio **3,50** fr. sv. (**4**); Usono **1** dol. (**1,25**).

Ankaŭ duon- kaj kvaron-jare abonebla.
Poekzemplera prezo: **0,30** mk. g.



Mendu provekzempleron ĉe Administracio de SAT

Richard Lerchner, Colmstrasse 1, Leipzig - O - 27, Germanio

Pagu prefere per ŝtataj monbiletoj en registrita letero.

La germanianoj pagu al poŝtĉeka konto de la Administranto N° 6835.

La abono validas nur post pago kaj komenciĝas kun ĉiu jarkvarono.

Le Gérant: L. GLODEAU. ★ Esperanto-Presejo J. SOLSONA, 9, rue Hallé, Paris-14e